

1984 marto
77a jaro
n-ro 939 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Allan
Roberts:

De "absolute kontraŭ" al senrezerve por

Vi trovos,

ke unu el la nekrologoj sur la paĝo 215 de nia decembra numero pasintjare estis erara. Lorcán ÓhUiginn el la meza kolumno de tiu paĝo telefonis al ni antaŭ nelonge kaj asertis pri sia bonfarto. Vi povas imagi, ke nun ni komencis malbone farti. Ni rapide konstatis, ke ni en la redakcio ne eraris, ĉar verva korespondantino de s-ro ÓhUiginn sendis al ni "laŭordan" komunikon, eĉ kun la koncerna dato. Kiam ni demandis klarigon, ŝi konfesis, ke revenis unu el ŝiaj leteroj, kaj ŝi opiniis, ke... Nu, ni tamen ŝuldas al s-ro ÓhUiginn pardonpeton pro la erara apero de lia nomo en nia rubriko "Laste malaperis...", kaj ni ĝojos revidi lin dum la Kongreso en Vankuvero. Aliflanke, ni dankas al li, ĉar li savis nin de la alia pardonpeto – tiu pri la malfruo de la revuo –, kiun ni ĉi-foje apenaŭ kapablas verki. Fartu ĉiuj bone!

Enhavo

- 41 Aplikado de Esperanto: Jubileo de Pola Radio (S. Milojević)
- 42 Faka agado: Grandproportiaj iniciatoj en San-Marino; Bona filo serĉas patron
- 43 Parlamenta agado: Forta parlamenta subteno en Britio (B. Barker)
- 44 Faka agado: Svedaj sindikatoj helpe de Esperanto vizitis Nederlandon (Geoffrey Sutton)
- 45 Kulturo: Alvokas Serio Oriento-Okcidento (B. Ragnarsson)
Reklamado: Anoncoj ĉe UEA fariĝas pli kostaj
- 46 Ĉi-jara kongreslando: Kanado estas escepte bela kaj surpriza (Kriss Smilga)
- 50 Kongresa komunikado (novaĵoj pri la 69a UK en Vankuvero)
- 51 Kalendaro: Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kursoj, kunvenoj...
- 53 Recenzoj: *Iluzioj* de Lorjak (James F. Cool); *Viveroj* de A. Rodríguez Castela/Fernando de Diego (Leopoldo H. Knoedt); *La rompitaĵoj flugiloj* de Ĝ. Ĥalil' Ĥibran'/G. Abraham (G. Berveling); *Homa lingvo kaj komputilo* (W.F. Pilger); *Vilaĝo Borovo* de Kum Velkov/A. Grigorov (Klaus Schubert); *Kroatia poezio* de I. Krtalić/S. Štimec (Leopoldo H. Knoedt)
- 56 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 57 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 58 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
- 60 Nekrologoj (S. Ellyard. P. de Oliveira Ludka, H. Matzinger-Benz, A. Rajski, Kenneth A. Sly, M. Walker); Anoncetoj

La kovrilo

Kiam politikisto foje faras publikan deklaron, li aŭ ŝi emas resti ĉe ĝi eĉ se la postaj spertoj kaj jaroj pruvas kompletan absurdecon de tiu iama elpaŝo. Feliĉe, ekzistas homoj, kiuj kapablas venki siajn proprajn antaŭjuĝojn, kiuj kapablas reekzameni siajn starpunktojn. Tian admirindan virton posedas s-ro Allan Roberts (maldekstre sur nia kovrila foto), membro de la Dua Ĉambro de la Brita Parlamento. Dum la parlamenta elektokampanjo en 1979, s-ro Roberts deklaris sin esti "absolute kontraŭ" Esperanto. Li nun estas unu el la plej entuziasmaj anoj de la brita Parlamenta Esperanto-Grupo (vidu la paĝon 43), kaj li intencas starigi Esperanto-kurson por parlamentanoj. Brave!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvtilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven-dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Jubileo de Pola Radio

Antaŭ 25 jaroj, la 4an de aprilo 1959, okazis la unuaj Esperantaj elsendoj de la Pola Radio. Nun, kvaronan jarcenton pli poste, ni povas facile konkludi, ke eble tuta duono de ĉiuj radio-programoj, iam ajn okazintaj en la Internacia Lingvo, ŝuldiĝas al tiu admirinda konstanteco de la nacia radio de la patrujo de Zamenhof kaj Esperanto. Estas facile aserti ankaŭ, ke tia praktika utiligo de la Internacia Lingvo estas – sen ajna dubo – la plej granda kaj la plej valora rekono, kiun la Zamenhofa lingvo rikoltis en sia tuta ĝisnuna historio.

Ni ofte emas pretervidi la gravecon de ĝuste tia utiligo de Esperanto. Ni inklinaĵas pli aprezi diversajn supraĵajn diplomatajn deklarojn, belvortajn rezoluciojn, lerte formulitajn proklamojn, malantaŭ kiuj staras kompleta vakuo aŭ malbonvolo doni al ni eĉ la plej etan praktikan apogon. Ni montriĝas ekstreme mallertaj distingi amikojn de malamikoj, ni trompiĝas kaj naive kaptiĝas de la strasaj brilo kaj belo de senenhavaj vortoj. Ni facilanime konsentas etikedi la elsendojn de la Pola Radio aŭ Radio Pekino, kiel ŝtatan politikan propagandon, kvazaŭ misuzon de la Zamenhofa lingvo.

Ni eraras. Se ŝtatoj kaj limoj jam ekzistas, se ili ankoraŭ restas – kaj longe restos – la ĉefa potencportanto en ĉi tiu mondo, ni devus efektive ĝoji, ke malantaŭ tiuj elsendoj ja staras la ŝtato kaj ĝia potenco. Tio garantias – kiel ni vidas en ĉi tiu kazo – la konstantecon kaj la malprivatecon kaj oficialecon, kiun ni en la Movado neniam povus certigi al nia lingvo.

Kiel ni antaŭ iom da jaroj skribis en ĉi tiu revuo, neniam estis vera problemo, ke aperas la ŝtata subvenciata *El popola Ĉinio*; la problemo restas, ke ankoraŭ ne komencis aperi ŝtate (aŭ eĉ private) subvenciotaj periodaĵoj "El kia ajn Usono", "El nebula Britio", "El diligenta Japanio", "El kafa Brazilo", "El nafta Kuvajto" aŭ simile. Ni devus pledi por ke ankaŭ la registaroj de tiuj kaj aliaj landoj komencu utiligi Esperanton, eĉ se por propagando, des pli ke ili faras tion en aliaj – precipe siaj propraj – lingvoj. Ne devus ĝeni nin la ekzisto de la Esperantaj elsendoj de la Pola Radio kaj Radio Pekino, sed ni ja ĝeniĝu pro

la manko de nialingvaj programoj en la elsendoj de la Brita Radio, de la usona, japana, franca ktp.

Cetere, se vi iam aŭskultis la programojn de la Pola Radio en Esperanto, vi ne povis preteratenti la kvalitoŝanĝon de tiuj elsendoj: ili ĉiam pli kaj pli atentigas la dezirojn kaj bezonojn de la aŭskultantoj. Vi trovos tie – sesfoje tage! – amason da pure movadaj informoj kaj novaĵoj, kiuj neniel ligiĝas al la lando, registaro aŭ politika propagando. Kio cetere estas, kaj kio ne estas propagando? Aĥ, tiu kompatinda fiero Unesko, kiu aŭdacis levi kelkajn fundamentajn demandojn sur tiu kampo, kaj nun spertas la minacojn pri financa strangolo, ĉar la "libera mondo" eltenas liberecon de tiaj diskutoj nur ĝis ili komencas minaci ĝian sendisputan superregon. Kvankam ni volonte revenos al tiu Unesko-temo, ni supozeble jam nun devus konscii, ke ni esperantistoj en tiu tuta hipokrita ludo kontraŭ la nova monda informa ordo estas profunde ie en la Tria Mondo, ĉar niaj novaĵoj ricevas la saman trakton en la grandaj agentejoj, kiel tiuj de Afriko aŭ Hinda Unio.

Ĉu vi foje primeditis la lukson, kiun al la monda esperantistaro donacas dum la lastaj jaroj la redakcioj de la Pola Radio aŭ Radio Pekino: vi sidas hejme fine de julio aŭ komence de aŭgusto kaj informiĝas plurfoje tage pri la laboroj de la Universala Kongreso, kiu okazas en alia kontinento? Ĉu vi pretus forĵeti ankaŭ tion, kiel politikan propagandon, des pli ke ankaŭ tion finansas la koncerna ŝtato? Ni kredas – kaj ripete asertas – ke tiaj servoj de la amaskomunikiloj apartenas al la plej grandaj venkoj de la Internacia Lingvo.

Feliĉe, la Esperantaj elsendoj de la Pola Radio jam havas tute vastan movadan publikon. Pliaj aktivaj sekvantoj de la programoj, tiuj kiuj foje ankaŭ mem aŭdiĝas per poŝtkarto aŭ alia rekonmaniero, ĉiam estas bonvenaj. Tio povas nur plifirmigi la pozicion de la Zamenhofa lingvo, ne nur ĉe la Pola Radio sed ankaŭ plej ĝenerale. Tio povas tre pozitive influi ankaŭ la karakteron de la programoj, je ĉiufanka ĝojo sendube.

Estas tute aparta demando, ĝis kiu grado la esperantistaro ankoraŭ devas malkovri la avantaĝojn, kiujn la regulaj ĉiutagaj radio-elsendoj prezentas por la diskonigo de la movadaj informoj. Estas tempo ĉesigi tiun ludon en kiu la kunmetantoj de la radio-programoj serĉas materialon por sia elsendo, dum la esperantistaro erarvagas serĉante la diskonigontojn de siaj informoj. Ni povas fari la radio-elsendojn pli utilaj ol ili estas.

Ni parolis pri la Pola Radio, ĉar ĝi jubileas. Tamen, ĉio dirita pri ĝi grandparte validas ankaŭ por la elsendoj de Berno, Pekino, Romo, Vatikano, Vieno kaj Zagrebo. Ili ĉiuj bezonas nian senrezervan apogon.

Simo Milojević

AVERTO

UEA HAVAS BELAN KUTIMON SENDI EN LA UNUAJ TRI MONATOJ LA JARO ĈI TIUN REVUON ANKAŬ AL TIUJ, KIUJ ANKORAŬ NE PAGIS SIAN ABONON. NU, TIU LUDO NUN FINIĜIS: TIO ĈI ESTAS LA LASTA NUMERO, KIUN VI RICEVAS ANTAŬ OL REKOTIZI POR ĈI TIU JARO.

Grandproporciaj iniciatoj en San-Marino

De la 27a de decembro pasintjare ĝis la 7a de januaro okazis en la malgranda sud-eŭropa respubliko San-Marino Unua Sanmarina Universitata Seanco. La aranĝon partoprenis proksimume sepdek eksterlandanoj.

En la inaŭguro parolis la Ministro pri Klerigo kaj Kulturo, d-ino Fausta Morganti, la konstanta reprezentanto de San-Marino ĉe Unesko, d-ino E. Tamagnini, la observanto de San-Marino ĉe Eŭropa Konsilantaro, d-ino L. Pedini, kaj la episkopo de San-Marino, monsinjoro Locatelli.

La programo konsistis el diversaj eroj: ok-horaj kursoj pri kibernetiko, pedagogio, kultursciencoj kaj natursciencoj, lingvokursoj por neesperantistoj kaj aro da diversfakaj prelegoj. Nur kvin aŭ ses prelegantoj uzis alian lingvon ol Esperanton, sed iliajn prelegojn oni interpretis aŭ resumis en Esperanto.

Inter la science kaj lingve altnivelaj prelegoj estis "Enkonduko en la kibernetikan pedagogion" (Helmar Frank, FR Germanio), "La influo de Immanuel Kant al la pedagogio" (Giordano Formizzi, Italio), "Marmamuloj, kun speciala konsidero al cetacoj" (Wim De Smet, Belgio), "Strukturo kaj evoluo de nia galaksio" (Hans-Michael Maitzen, Aŭstrio), "Descartes kaj Leibnitz kiel prainterlingvistoj" (István Szerdahelyi, Hungario), "Apliko de la kibernetiko al la juro en Soveta Unio" (Ivo Lapenna, Britio), "Metodoj de elektriika modeligo en la hidrologio" (Ottó Haszpra, Hungario) kaj "Plantmalsanoj kaj la verda revolucio" (Paul Neergaard, Danlando).

Inter la celoj de la renkontiĝo estis ankaŭ fondo de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kiel oficiala institucio de Respubliko San-Marino. Ĝi nun konsistas el proksimume 80 universitataj profesoroj kaj aliaj. Ĝia oficialigo ankoraŭ ne okazis pro la tempobezono de la leĝaj procedoj kaj restanta neklareco en la koncepto pri la nova organizaĵo. AIS rajtas fari organizan agadon surbaze de sia provizora statuto de Instituto de Kibernetiko de San-Marino, iom utiligante ĉi ties buĝeton. Post kelkaj monatoj ministrino Morganti prezentos leĝproponon antaŭ la Parlamento. Ŝi jam informis, ke troviĝas bieno kun rekonstruita trietaĝa domo, estinta metilernejo, kiu estos disponigita al AIS, same kiel eble plia konstruaĵo.

Ankoraŭ ne estas klare, kiuj pagos por la agado de AIS. Kelkaj ĉeestantoj kritikis ĝian nomon, ĉar ĝi pli similas al "postdiploma altlernejo" ol al "akademio".

Oni krome atentigis pri la neceso klare distingi inter scienca kaj instrua agadoj. Esperanto kaj la itala estas la oficialaj lingvoj de la organizaĵo, sed oni eble aldonas aliajn naciajn lingvojn. Se AIS sukcesos oficiale fondiĝi kiel sendependa ŝtata institucio, ĝi okazigos sian sekvan kunvenon en septembro.

La motoro malantaŭ la tuta aranĝo kaj ĉiuj planoj en San-Marino estas prof. Helmar Frank. Kiel okazis plurfoje antaŭe kun liaj ofte aŭdacaj sed ĉiam funde pripensitaj iniciatoj, prof. Frank ankaŭ nun surprizas la Esperanto-movadon. UEA kompreneble interesiĝas pri la planoj en San-Marino, kaj ĝi tial delegis al la gvidanto de sia Scienca Eldona Centro, prof. Haszpra, partopreni la aranĝon, kiun parte ĉeestis ankaŭ d-ro Corsetti, estrarano pri planado. Kvankam San-Marino ja estas malgranda ŝtato (ĝia loĝantaro nombras du trionojn de la membraro de UEA) kaj spite la fakton, ke ni vivas en mondo regata de manpleno da ekonomiaj kaj politikaj grandpotencoj, ni devus kun danko akcepti la apogon de San-Marino al la Internacia Lingvo, des pli ke oni neniam povas havi tro da amikoj. Ni do kun daŭra intereso sekvos la evoluon de ĉi tiu nova iniciato kaj provos raporti pri ĝi eble eĉ malpli reteneme ol ni nun faris.

Bona filo serĉas patron

La titolo povus ankaŭ teksti: *bona filo serĉas patrinon*, se vi interesiĝas pri kontraŭvirina diskriminacio.

Ĉiukaze la fakto estas jena: unu el la plej junaj kaj samtempe plej viglaj anoj de nia esperantlingva komunumo ne ĉesas kreski. Temas pri Esperanto-Societo (Malta).

Per helpo de UEA, de Sveda Esperanto-Federacio kaj de Internacia Kultura Servo el Zagrebo, ESM eldonis en la pasintaj jaroj informilojn kaj lernilojn en la malta lingvo. Ĝi ne nur eldonis sed ankaŭ *disdonis* tiun materialon, kaj sekve ĝia membraro rapide kreskis.

Nun ĝi sukcesis pretigi ampleksan manuskripton de koresponda kurso de Esperanto en la malta. Ĉio estas preta, mankas nur mono por eldoni la aĵon.

Se vi opinias, ke Esperanto devas disvastiĝi ĉie en la mondo, se vi estas influa membro de Esperanto-grupo aŭ de Esperanto-asocio landnivela, se vi estras eldonejon de esperantaĵoj, ni opinias, ke vi devus respondi al la alvoko de la komisiono pri landa agado de UEA kaj "adopti" Malton. Vi akiros filon, pri kiu vi fieros.

Kontaktu rekte kun Esperanto-Societo (Malta), P.O. Box 142, Valletta, Malto.

Forta parlamenta subteno en Britio

La parlamenta agado en Britio komenciĝis en 1973. Ĝi nun estas ne plu kampanjo sed tuta movado por gajni subtenon al Esperanto inter la membroj de la Brita Parlamento. Ke tiuj klopodoj sukcesas, pri tio vi facile konvinkiĝos el la sekva raporto de Brian Barker, la ĉefa organizanto de la parlamenta agado en Britio. En sia akompana letero Barker skribis al ni i.a. jenon: "Se alilandaj esperantistoj timas malsukceson kaj opinias, ke ankoraŭ estas 'tro frue', neniam komenciĝos la laboro en aliaj landoj. Ofte tiu timo pri malsukceso estas preteksto por neaktivado. Se ni atendus ĝis la cirkonstancoj estos perfektaj, ni atendus ĉiame!"

La 31an de januaro okazis en la brita parlamentejo akcepto, kiun partoprenis 44 parlamentanoj el kvin partioj plus Charles Wightwick, inspektoro pri Esperanto ĉe Departemento pri Edukado kaj Scienco, John Trim, direktoro en Informa Centro pri Lingva Instruado, Walter Morley, lerneja inspektoro de la londona eduka instanco, prof. R.H. Robins de la Universitato de Londono, Alan Wilding, fakestro de la brita disaŭdiga kompanio BBC, kiu kompilis 45-minutan radio-programon pri Esperanto, kaj redaktoro de la lingvistika serio de la eldonejo Longmans.

La gastiganto de la akcepto estis kimra parlamentano, Geraint Howells (Liberala partio). En sia parolado li emfazis la subtenon de kimraj parlamentanoj al la Internacia Lingvo. Ĉeestis la akcepton John Stradling Thomas, Ministro pri Kimraj Aferoj, kiel ankaŭ Wyn Roberts, parlamentano kaj Sekretario pri Kimraj Aferoj. Efektive unu triono de ĉiuj kimraj parlamentanoj en la brita parlamento estas membroj de Parlamenta Esperanto-Grupo.

Parlamentano Howells emfazis ankaŭ la kreskantan bonvolon kaj pretecon helpi Esperanton ĉe granda nombro da britaj parlamentanoj. La membraro de Parlamenta Esperanto-Grupo nun nombras 153 – la plej alta nombro iam atingita – kaj ankoraŭ venas aliĝoj.

Respondante al la parolado de Howells, Manjo Austin, la prezidantino de Esperanto-Asocio de Britujo, menciis la ĵus eldonitan raporton pri la esploro krei duonaŭtomatan traduksistemon, kiu uzas Esperanton kiel pontolingvon. La raporto (vd. en *Esperanto* de januaro) forte proponas provprojekton kaj postan utiligon de Esperanto en eŭropaj instancoj. La esploron financis Eŭropa Komisiono. Manjo Austin



La Supra Ĉambro de la Brita parlamento planas debati pri Esperanto laŭ iniciato de Lordo Briginshaw.

krome emfazis la nepran neceson enkonduki Esperanton en la lernejojn por provizi la homfortojn bezonatajn por teknologia estonteco.

En postaj konversacioj la reprezentantoj de EAB ne devis defendi Esperanton. Parlamentano Allan Roberts, kiu en la politika kampanjo antaŭ la brita nacia balotado esprimis sian "absolutan kontraŭstaron" al Esperanto, ĉeestis la akcepton kaj poste eĉ aliĝis kiel membro de Parlamenta Esperanto-Grupo. La plej granda surprizo tamen estis, ke la sama parlamentano Roberts volas studi Esperanton kaj petis nin organizi tiucelan kurson por parlamentanoj en la parlamentejo mem.

Raportoj pri la evento aperis naciskale en ĵurnaloj, i.a. en *The Guardian*. Oni disdonis al ĉiu partoprenanto la libreton *Esperanto and Machine Translation* (Esperanto kaj maŝina tradukado) de d-ro Ian Kelly, la prezidanto de Brita Grupo por Maŝin-Tradukado.

Invititaj al la akcepto estis ankaŭ britaj membroj de Eŭropa Parlamento, rezulte de kio f-ino Beata Brookes, eŭropa parlamentano, proponis similan

akcepton en la sidejo de Eŭropa Parlamento en Bruselo. Ni ja akceptis la proponon nome de Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo (EPEG), por kiu Beata Brookes organizos tiun kunvenon. EPEG, kiu fondiĝis en la fino de 1982, nun havas 26 membrojn el kvin landoj.

Por fini mi diru, ke ni malofte raportas pri nia sukceso, ĉar mankas la homfortoj por tion fari. Por kuraĝigi la laborantojn kaj varbi helpantojn nepre necesas tia raportado, sed nia unua prioritato estas informi la publikon, kaj tiucele ni uzas ĉiujn homfortojn disponeblajn.

Brian Barker

FAKA AGADO

Svedaj sindikatanoj helpe de Esperanto vizitis Nederlandon

La decembra numero de la A3-formata gazeto de la sindikato Sveda Elektrista Federacio, *Elektrikern* (la elektristo), enhavas plurajn artikolojn, kiuj rilatas al Esperanto. Tio okazis unuavice pro la iniciato de svedaj elektristoj-esperantistoj entrepreni oficialan sindikatan viziton al Nederlando, utiligante la Internacian Lingvon.

Post la enhavolisto de la gazeto aperas sur la kovrila paĝo por la legantoj verŝajne enigma kaj eventuale scivoliga novjara bondeziro ankaŭ en Esperanto. La numero estas preskaŭ temnumero pri Nederlando. Unu paĝo da koncizaj informoj pri Ne-

derlando (p.14) estas prenita el la Esperanta broŝuro *Nederlando koncize*, kun agnosko pri ties eldoninto, Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Paĝo 20 traktas viziton de la reprezentantoj de Sveda Elektrista Federacio kaj de la gazeto *Elektrikern* al la nederlanda Asocio por Antaŭenigo de Elektroteknika Fakedukado, kie ili renkontis reprezentantojn ankaŭ de diversaj nederlandaj kaj flandraj Esperanto-organizaĵoj. Tie oni uzis Esperanton kiel pontolingvon en la diskutoj.

Sur la posta paĝo troviĝas artikolo pri energiprovizado en Nederlando. La grafikaĵon pri tio oni prenis el *Energio*, Esperanta libro eldonita de Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando; ankaŭ ĝi kun agnosko. La 36a paĝo traktas la 16an Pupteatran Internacian Festivalon en Zagrebo, kie prezentis i. a. la sveda pupteatro Totem.

Paĝo 37 donas facile digesteblan skizon pri la historio, konstruo kaj funkcio de Esperanto. Bedaŭrinde oni – kontraŭ la Principaro de Frostavallen (1956) – elektis nomi Esperanton "helplingvo", kio donas impreson pri nekompleta lingvo, kiun oni uzu nur en kazo, kiam ĉiu taŭga rimedo jam malsukcesis!

La posta paĝo 38 prezentas la sciencfikcian rakonton *Ĉerizoj de Priokono* de Damir Mikulić (Jugoslavio), kiun el Esperanto tradukis Gunnar Nilsson.

Kaj la svedaj kaj la nederlandaj sindikatanoj estis kontentaj pri la vizito, kaj estas tre utile, ke tiom da seriozaj artikoloj tuŝantaj Esperanton aperas en sindikata gazeto. Oni krome rimarkas, ke plurajn aliajn artikolojn pri Nederlando oni tradukis el la angla, ĉar aperas nederlandaj provinconomoj kaj titoloj de pentraĵoj de Rembrandt sentraduke en tiu tria nacia lingvo! Eble ankaŭ tio igos iun pripensi la neŭtralan rolon, kiun ludas Esperanto.

Geoffrey Sutton

Esperanto — det interna- tionella hjälpspråket

Många är orsakerna till krigen — bl a ekonomiska lågkonjunkturer, nationalism, chauvinism, politiska och religiösa misshälligheter inom och mellan nationerna. En annan orsak, värd att nämna, är den nationella splittringen själv. Människorna har olika sedvänjor och traditioner och framför allt språk. Man har därigenom att förstå varandra och varandras intentioner uppstår fruktan, och


nar med, att han vid sin död talade och förstod inte mindre än tjugo språk vid sidan av det språk han själv givit upphov till.

Förstod vad chauvinism var

Med sitt starka sociala intresse blev Zamenhof efter avslutade medicinska studier läkare och arbetade sedan i den polska arméns fattigvård. När han vid sin död talade och förstod inte mindre än tjugo språk vid sidan av det språk han själv givit upphov till.

med esperantister från hela världen. Esperanto är mest utbrett i Kina, Iran och Brasilien men stora och nytydande organ

em, Bulgarien, Tjeckoslovakien, Polen, Frankrike, Belgien, Schweiz och under närmast i Australien. I runt tal ca 2 miljoner människor talar hjälpspråket. Esperanto finns i alla länder.



Den 22 april år 2183:

I morgon skall jag fylla 12 år. Mor har sagt mig att hon skall baka en sådan där tårta, som jag tycker så mycket om, en tårta med korsbar från Prokiono. Vi kommer alla att sitta runt bordet, och tårtan skall lysa, korsbaren skall lysa i den i alla sina himmelsklara färger såsom endast korsbar från Prokiono kan lysa. Jag älskar de där färgerna. De är som en av de där eldarna som vi ordnar under festen, när vi tar emot våra vänner från Sirjus som våra gäster. Jol slapper ut sina tårta färgar från lådan som de förvaras i, och dansar runt omkring bonuss. deras talkosa träd. Jag vet att rummet och vill spårja honom, och själv brukar jag gå runt för att komma undan dem. Dessa är nämligen kloka undrar, dresserade som min, bonuss Garo. Det är roligt, men det är det finaste för

också till min utomordentliga talang, som hon berättar om och förklarar för de vuxna. Det är nämligen så, att när jag åter korsbar från Prokiono, känner jag dem i minnet, men inte bara smaken utan också mycket annat, till exempel färgerna. Jag har berättat det där för först mig och sedan för far, så att de skulle få reda på det. Jag berättade för dem att jag med minnen räddar färgerna medan jag ligger på korsbaren, och jag sänder och typer in mina färgar, som lyser, som min far pålade om det har för mig vänner från Prokiono. Jag berättade om det för min blottade bror och syster och deras hedersgäst, naturligtvis för korsbaren och min vanliga talangs skull. Mor sa: Dessutom att jag ingenting skulle få läsa om detta för min far, eftersom han ville att det skulle vara en överraskning för mig att min underliga talang intresserade prokionerna

I morgon blir jag alltså 12 år, men det är inte det viktigaste. Det som betyder mest är det som sker i övermorgon. Då skall jag nämligen resa till Prokiono. Så exalterad jag är! För första gången skall jag resa tillsammans med far dit. Det blir hans födelsedagspresent, har han sagt. Men mor avslöjade sanningen för mig; att vi inte bara åker till Prokiono för min födelsedags skull, utan för att prokionerna bett min far att gasta dem. De ville nämligen undersöka mig med några apparater, som de inte kunde ta med till vår jord. Och ännu högtidligare: jag kommer att vara deras hedersgäst, naturligtvis för korsbaren och min vanliga talangs skull. Mor sa: Dessutom att jag ingenting skulle få läsa om detta för min far, eftersom han ville att det skulle vara en överraskning för mig att min underliga talang intresserade prokionerna



Alvokas Serio Oriento-Okcidento

Reciproka konigo kaj prezado de kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento, Nordo kaj Sudo: pri la neceso de tia agado ĉiuj facile interkonsentas. Ĉiuj ankaŭ scias, ke tio estas unu el la ĉefceloj de Unesko. Ankaŭ la Statuto de UEA konsideras tion inkluzivita en la celo "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo".

Demandus tamen iuj: Ĉu tradiciaj valoroj ankoraŭ havas sencon en la moderna mondo rapide akceliganta en elektronikan futuron, kiam la homoj ne plu konceptos kulturajn unuojn sed unuon? Al tia demando estas nur unu ebla respondo: Estigu io ajn, tamen la homa animo sin plutenos al la origina grundo, nutriĝos el ĝi, identiĝos per ĝi:

*Se mi pensas: roso
vizitas miajn duonfermitajn okulojn
la monta herbejo –
malseka laco post longa tago
tra nokto ĝis mateniĝo,
gracdonas laco...*

verkas islanda poeto: la spertoj de la origino daŭre restas ĉe ni kaj nuancigas kaj transformas postajn spertojn – la radikojn ni ne povas elŝiri. Por kompreni aliajn ni bezonas ŝlosilojn, praktike nur alireblajn en profundaj literaturaj verkoj, kiuj elektis la esencojn de originoj kaj interpretas ilin al tiuj, kiuj povopretas kompreni.

La Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA, lanĉita en 1961 per la verko *Malsata ŝtono* de Rabindranath Tagore, celas konigi diversajn originojn al homoj de aliaj originoj. La origino mem de la serio ligeblas al invito de Unesko en 1957 pri kontribuo al la realigo de la t.n. "Granda Projekto pri Reciproka Prezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj". En 1958 la estraro de UEA decidis doni plenan apogon al tiu projekto. Jam komence estis konstatitaj la relativa signifo de la vortoj "Oriento" kaj "Okcidento", kaj ke la neceso de reciproka konigo same valoras pri kulturaj valoroj de komunaj ĵoj en la kadro, ĉu de Okcidento, ĉu de Oriento. Dum la jaroj evoluis ankaŭ alia koncepto: la kontrastigo inter Nordo kaj Sudo, kiu kompreneble estas same relativa.

Dum tiuj 23 jaroj, kiuj pasis post la eldono de la unua libro en la Serio, en ĝin viciĝis 20 verkoj, 14 "okcidentaj" kaj ses "orientaj" (*Malsata ŝtono* enkalkulita) kaj unu "tutmonda" (*Tutmonda sonoro* de Kalocsay). Misekvilibro estas evidenta inter la du "kadroj" (ankoraŭ pli akcentita de tio, ke duono de la orientaj verkoj apartenas al unu sama kulturo, la

japana). Alia negativo estas ankaŭ priatentiginda: ke dum la lastaj jaroj stagno minacis la eldonritmon. Tial UEA nun urĝe alvokas por akiri proponojn pri eldonindaj verkoj en la serio, kun emfazo pri verkoj el "Oriento" kaj "Sudo", aparte el Ĉinujo, Koreujo, Vjetnamio, Indonezio, Filipinoj kaj Afriko. Estus bele, se ni estus sukcesintaj korekti la menciitan ekvilibran mison jam en 1987, la jaro de nia Jubileo.

Baldur Ragnarsson,
estraro pri kulturo

REKLAMADO

Anoncoj ĉe UEA fariĝas pli kostaj

En la ĉiutaga vivo la plimulto el ni facile spertas la gigantan kaj ne ĉiam bonfaman rolon, kiun en la hodiaŭa mondo ludas la reklamado de la plej diversaj produktoj kaj servoj. Aliflanke, la Esperanto-movado mem neniam sciis ĝuste aprezi la gravecon de la reklamado kaj propagando, ne nur kiam temas pri la informado de la ekstermovada publiko, sed precipe kiam temas pri la reklamado inter la esperantistaro.

Antaŭ du jaroj (numero de majo 1982), ni jam skribis, ke la redakcio de ĉi tiu revuo tro ofte, preskaŭ ĉiutage, ricevas petojn pri senpaga aperigo de anoncoj kaj anoncetoj. Ni ankaŭ faras tion ĉiufoje kiam ni opinias, ke la koncerna informo havas pli larĝan movadan signifon, kiam ni taksas, ke la petanto efektive ne povas pagi aŭ transpagi, kiam ni juĝas, ke el la disanoncado ne profitos unuopulo sed minimume loka klubo aŭ landa asocio. Tamen, la eldonaĵoj de UEA ĉiukaze publikigas amason da anoncoj pri la plej diversaj aranĝoj kaj entreprenoj ekster la anoncopaĝoj. Rigardu en ĉi tiu numero, ekzemple, la plurpaĝan rubrikon "Kalendaro" kaj notu, ke neniuj pagis ajnan cendon por la aperigo de tiuj informoj. Same estas pri nia konstanta rubriko "Laste aperis...", kiu senpage por la eldonistoj diskonigas la aperon de iliaj libroj. Tion cetere faras ankaŭ la ampleksa librokatalogo, kie ĉiuj bibliografiaj informoj aperas senpage, kvankam la kompilado, kompostado, enpaĝigo, presigo kaj distribuo de tiu unika movada eldonaĵo kostas al UEA plurajn dekmilojn da guldenoj.

Aliflanke, la anoncopaĝoj en la eldonaĵoj de UEA estas larĝe malfermitaj al tiuj unuopuloj kaj organizaĵoj, kiuj deziras diskonigi ion al la tuta Esperanto-movado. Foje, kvankam tre malofte,

UEA malkonsentas aperigi difinitan anoncon, ĉar ĝia teksto kontraŭas la bazajn principojn de la Asocio.

Pagitaj anoncoj estas grava ero en la buĝeto de kelkaj el la UEA-eldonaĵoj. Ekzemple, ili en 1983 kontribuis al la buĝeto de ĉi tiu revuo per pli ol 10 000 guldenoj. Aliflanke, anoncoj estas certe ankaŭ la plej efika maniero por vaste diskonigi ion tra la Movado. Kalkulu mem surbaze de niaj novaj anoncotarifoj, kiuj validas ekde la 1-a de marto ĉi-jare:

Tutpaĝa anonco kostas 700 guldenojn, duonpaĝa 370, kvaronpaĝa 200, okonpaĝa 120, deksekonpaĝa 75 guldenojn. Eblas mendi ankaŭ diversajn kombinojn de tiuj paĝonoj: tri kvaronoj (540 gld), tri okonoj (285 gld), tri deksekonoj (160 gld). Plej ofte ni mem zorgas pri la grafika aspekto de la anoncoj, foje ankaŭ pri la enhavo, se la mendanto donas al ni almenaŭ iom da ideoj pri siaj deziroj. Notu tamen, ke la menciitaj prezoj rilatas nur al la mendoj de movadaj anoncoj, kiuj diskonigas aranĝojn por esperantistoj aŭ librojn en aŭ pri Esperanto. La prezoj de la komercaj anoncoj pri varoj kaj servoj, kiuj ne rilatas al Esperanto, kostas duoble. La prezoj duobliĝas ankaŭ, kiam la klientoj, movadaj aŭ nemovadaj, insistas pri la aperigo sur la lasta kovrilpaĝo (kio plej ofte signifas anoncon en dukolora preso).

Kiam ni asertas, ke la anoncado en ĉi tiu revuo estas malpli kosta ol alimaniere diskonigo, ni kompreneble ne pensas pri tutpaĝa anonco sur la lasta kovrilpaĝo (ĉar tio nun kostus 1 400 guldenojn al movada, kaj 2 800 al nemovada mendanto). Ni per tiu aserto celas la malpli grandajn anoncojn. Kvaronpaĝa anoncospaco povas tamen enhavi amason da informoj, kaj kostas nur 200 guldenojn. Memoru, ke ĉi tiun revuon en 1983 regule ricevadis preskaŭ 6 500 personoj, kaj legis ĝin (laŭ enketo antaŭ kelkaj jaroj) ĉirkaŭ 13 000 homoj. Se vi aperigas anoncon por 200 guldenoj, vi alparolas tiel grandan publikon. Aliflanke, se vi decidis ne anonci, sed turni vin cirkulere al la publiko, kalkulu kiom da leteroj vi povus ekspedi por la sumo de 200 guldenoj aŭ kiom da miloj da guldenoj vi bezonus, se vi volus cirkuleri al ĉiuj 6 500 ricevantoj de nia revuo!

Ni refoje memorigu pri la malnova praktiko de UEA, kiu donas 30-procentan rabaton al tiuj, kiuj sukcesas varbi komercan, ekstermovadan anoncon por unu el niaj periodaĵoj. Se vi varbas, ekzemple, tutpaĝan kovrilan anoncon por ĉi tiu revuo, vi aŭ via loka klubo povus gajni makleraĵon de 840 guldenoj. Ĉu ne valoras penon almenaŭ provi varbi tian anoncon? La Centra Oficejo volonte disponigos al vi pliajn informojn (ofte eĉ nacilingvajn varbilojn) ĉi-rilate.

Bonvolu noti, ke ŝanĝiĝis ankaŭ la anonctarifoj en la aliaj eldonaĵoj de UEA: Jarlibro (ekde 1985 tutpaĝa movada anonco kostos 280 gld), *Kontakto* (ekde majo 1984 tutpaĝa anonco kostos 210 gld), pri kio vi pli detale informiĝos el tiuj periodaĵoj mem.

Kanado estas escepte bela kaj surpriza



Teorie almenaŭ, ĉiu kvinmembra familio povus disponi pri du kvadrataj kilometroj da areo por si mem. Tian areolukson ĝuas ĉ. 25 milionoj da kanadanoj, kies lando inter tri oceanoj okupas preskaŭ 10 milionojn da kvadrataj kilometroj. Sed eĉ lando de tiaj vastoj, precipe se nova kiel Kanado, facile povas forgesiĝi en la nuna mondo. Eble nur nun, kiam definitive foriras la homo, kiu reinstruis al-la mondo la nomon de Kanado, ankaŭ ni menciui lin – Pierre Elliott Trudeau, kanada ĉefministro de post 1968 kaj unu el la plej rimarkindaj mondaj politikistoj dum la lastaj du jardekoj. Eventuale ankaŭ ni esperantistoj ŝuldas al li la malkovron de Kanado, ĉar ni jen kongresos tie unuafoje en nia historio, kiu estas nur iom malpli longa ol tiu de Kanado.

Kanado estas, laŭ grandeco, la dua lando de la mondo, post Soveta Unio. Ĝi havas nur unu najbaron, Usonon, kun kiu ĝi dividas la plej longan (pli ol 8 800 km) neprotektitan landlimon. Ĝiaj aliaj tri flankoj tuŝas tri oceanojn: Atlantikan, Pacifikan kaj Arktan. Kanado etendiĝas al nordo tiel malproksime, ke nur unu triono de la lando – strio kelkcent kilometrojn larĝa ĉe la suda limo kun Usono – estas taŭga por komforta vivo de la homo.

La unuaj loĝantoj de Kanado venis antaŭ dek mil jaroj el Azio. Ili estis la prapatroj de la indianoj, kiuj nun nombras ĉirkaŭ kvaronan milionon. La alia grupo de praindiĝenoj, la eskimoj, nombras ĉirkaŭ 12 000 kaj loĝas en disaj, ofte etaj komunumoj.

La unuaj eŭropanoj, kiuj atingis Kanadon, estis vikingoj el Gronlando kaj Islando ĉirkaŭ la jaro 1000, sed ili ne sukcesis fondi daŭran komunumon.


Pro la grandeco de Kanado – ĝia larĝo egalas al la distanco inter la norda poluso kaj Romo – la klimato tre varias. En la teritorio Jukono la temperaturo falas ĝis -80°C , tiel ke la oleo en aŭto fariĝas densa kiel gudro, kaj pulmo de homo povas frostiĝi en kelkaj minutoj. Sed en suda Alberto la varmo povas atingi 45°C somere. Ĉe la okcidenta bordo la pluvokvanto atingas 4,5m jare, dum interne de Brita Kolumbio ĝi estas nur 30cm. La prerio kaj orienta Kanado estas relative sekaj. Kelkaj vintroj estas mildaj, dum aliaj terure malvarmaj. Frostoj povas veni eĉ somere, same kiel varmego.

La orientaj ĉemaraj provincoj apartenas al la geologie malnova Apalaĉa Montaro. Kovritaj de arboj, la montoj kaj valoj liveras ligno-materialon por eksporto. Tie ne estas multe da bona tero por agrikulturo. Oni kulturas tie plejparte terpomojn, kaj en ŝirmitaj valoj pomojn. La riveroj estas riĉaj je atlantika salmo, dum en la arbaroj kuras alkoj kaj cervoj. Ĉasistoj venas el tuta Norda Ameriko. La multnombraj riveroj krome liveras hidroelektron i.a. por funkciigi paperfabrikojn.

La moderna historio de Kanado komenciĝas en Kebekio, kie en 1663 la francoj fondis Novan Francion. Tiu provinco estas la centro de Kanado, trifoje pli granda ol Francio. Simila pejzaĝo regas kiel en la ĉemaraj provincoj. La tereno norde de la rivero San-



Sur la maldekstra paĝo indiana totemfosto en Vankuvero; ĉi-apude unu el la spirhaltigaj pejzaĝoj, kiujn Kanado abunde proponas al ĉiu ĝuopreta vizitanto.



Laŭrenco formas geologian strukturon, kiu etendiĝas tra la tuta kontinento kaj nomiĝas la Kanada Ŝildo. Dum la lastaj dek milionoj da jaroj ĝi restis neŝanĝita de la geologiaj fortoj. La plej granda parto de la minerala riĉo kuŝas en la Kanada Ŝildo. Krome, en ties faltoj kaj sulkoj kuŝas nekalkulebla nombro da lagoj. Sed la kupro, fero, oro, arĝento, zinko, nikelo, titanio, uranio, plateno, litio, nafto kaj natura gaso ŝanĝis Kanadon de agrikultura lando al industria.

En Kebekio loĝas unu triono de la kanada loĝantaro kaj pli ol 80% de ili parolas france. La oficiala lingvo de Kebekio estas la franca, dum Kanado estas oficiale dulingva. Kvankam multaj loĝantoj de la grandaj urboj de Kebekio parolas ankaŭ angle, en malgrandaj urboj oni parolas nur france. La kebekianoj konservis ne nur sian francan lingvon, sed ankaŭ siajn tradiciojn kaj kutimojn.

Ontario estas la geografia centro de Kanado. Tie situas la federacia ĉefurbo Otavo. Ontario havas la plej grandan nombron de loĝantoj, kaj duono de la kanadaj industriaj produktaĵoj devenas el Ontario. La provinca ĉefurbo, Toronto, estas ankaŭ la financa centro de Kanado. La tereno kaj klimato de Ontario estas tre diversaj. La sudo estas ebena agrikultura regiono, dum la nordo, sur la Kanada Ŝildo, havas arbokovritajn montetojn.

Manitobo, Saskaĉevano kaj granda parto de Alberto estas ebena prerio, kies senfina horizonto

donis la esprimon "granda ĉielo". Oni ordinare imagas prerion kiel vastan, senarbaran herbejon. Fakte nur mallonga zono de la suda parto estas vera prerio. Ĉirkaŭ trionon de la areo kovras ebena maldensa arbaro. La norda parto estas sovaĝa regiono de rokmontoj, valoj, riveroj kaj lagoj.

La suda parto de la prerio estas la grenejo de Kanado – foje nomata "La pankorbo de la mondo" – unu el la plej gravaj eksportantoj de tritiko. Plej ĉarme aspektas la prerio en junio, kiam la ŝajne senfinaj kampoj de tritiko ondas en delikata vento.

En la okcidenta parto de Alberto leviĝas la Roka Montaro, kiu etendiĝas tra Brita Kolumbio ĝis Pacifika Oceano. Albertanoj fieras pri siaj tritikkampoj, altkvalita bovaro, grandega kvanto da nafto, sed plej multe pri la montaro, eble pli bela ol Alpoj.

Preskaŭ tutan Britan Kolumbion okupas la Roka Montaro. Kvankam la beleco de la montaro ŝajne regas la provincon, la arbaroj sur la deklivoj donas lignon – trionon de la tutkanada produktado. Pro la bona klimato kaj abunda pluvo arboj kreskas ĝis alteco de 60 metroj.

La rivervaloj estas mallarĝaj, kio estas indiko pri ilia relativa noveco. Super la arbolimo leviĝas grandaj etendaĵoj de roko kaj neĝo, dramece impresaj. En la tuta regiono de la Roka Montaro ne ekzistas granda urbo. Kelkaj malgrandaj urboj kuŝas ĉe la ŝoseoj kaj la kvin trapasejoj. Preskaŭ la tuto estas uzata por



turismo kaj distro. Por konservi la belaĵojn la federacia kaj provinca registaroj aranĝis parkojn, kie bestoj estas protektitaj.

Ĉe la landlimo kun Usono troviĝas la nacia parko Waterton. Mildaj vintroj, vastaj herbejoj, proksimaj trapasejoj kaj antaŭe grandaj aroj da bizonoj allogis indianojn kaj blankulojn. La vegetaĵoj kaj bestoj abundas, dum super la valoj leviĝas la montoj Vimi kaj Blakiston (2 920 metrojn alta), kiuj majeste reflektiĝas en la tri lagoj. La lagoj en kelkaj lokoj estas 200 metrojn profundaj.

Pli norde troviĝas la naciaj parkoj de Banff kaj Yoho, kiuj ofertas altajn montojn, florabundajn herbejojn, vastajn glaciriverojn kaj la Trapasejon de la Kalcitranta Ĉevalo, kiu estas la plej alta punkto sur la transkontinenta fervojo.

Ĉe la elfluejo de la rivero Fraser troviĝas la laŭ grandeco tria urbo de Kanado, Vankuvero. Duono de la loĝantaro de la provinco Brita Kolumbio loĝas tie. La situo de Vankuvero eble estas la plej bela en Kanado kaj unu el la plej belaj en la mondo. La urbon nome ĉirkaŭas montaro, kies pintoj estas kovritaj de neĝo. Rivero dividas la urbon, dum okcidente kuŝas Pacifika Oceano. Preskaŭ ĉiu strato direktas al akvo aŭ montaro.

Proksime al la urbocentro, ĉe la interna haveno, troviĝas la fama parko Stanley – 400 hektaroj da natura arbaro, ĝardenoj, areoj por diversaj sportoj

kaj elmontrado de indianaj totem-fostoj. La parko estas preskaŭ tute ĉirkaŭita de akvo. Pro la milda klimato – la plej varma marbordo en Kanado – oni povas ĝui tenison aŭ golfoludon eĉ dum vintro. En la centro de la parko troviĝas bestoĝardeno kaj akvario. De sur la duoninsulo Prospect Point, 60 metrojn alta, oni ricevas belan vidaĵon al la markolo Burrard kaj la Ponto de la Leona Pordego, kiu ligas la nordan kaj sudan partojn de Vankuvero.

Simile belan lokon ĉe la markolo Burrard okupas la Universitato de Brita Kolumbio – la kongresejo de la 69a Universala Kongreso de Esperanto – sur la duoninsulo Grey en okcidenta Vankuvero. Pli ol 20 000 gejunuloj tie studas.

Vankuveron oni laŭdas pro moderna arkitekturo de la loĝejoj, aparte en la ĉirkaŭaĵo de la provinca universitato kaj sur la iama havenregiono sub la ponto Granville. La loĝantaro de la Norda Bordo havas kaj plaĝojn ĉe la pordo kaj skideklivojn malantaŭe. En frua somero, antaŭ ol la neĝo sur la montoj degelas, eblas skii kaj naĝi en la sama tago.

La loĝantaro de Vankuvero estas diversnacia. Ĉinoj okupas apartan distrikton, kun butikoj kaj restoracioj laŭ la nacia stilo. Lokaj indianoj, japanoj, orient-eŭropanoj kaj aliaj, ĉiuj trovis lokon en Vankuvero.

Kriss Smilga

Supre: La majesta vidaĵo de la vespera Vankuvero



Kongresa Komunikoj

69a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Vankuvero (Kanado) 1984 07 21 – 07 28

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: 53 North Boundary,
Vancouver, B.C., Kanado V5K 3S4.

Inaŭguro: La ĉefa gastparolanto dum la UK estos d-ro Max Yalden, ministro-komisiito pri oficialaj lingvoj en Kanado. D-ro Yalden estas profesia diplomato, kiu pasigis 4 jarojn kiel vic-ministro pri komunikado (1973-1977), antaŭ ol ricevi sian nunan postenon por sepjara periodo. Pro la specifeco de la lingva situacio en Kanado, la posteno de d-ro Yalden estas konsiderata kiel unu el la plej gravaj en la kanada registaro. Eksstudento de la universitatoj de Toronto (Kanado), Michigan (Usono), Paris (Francio) kaj Cambridge (Britio), Yalden doktoriĝis pri filozofio, studis la rusan lingvon kaj laboris interalie en Moskvo, Parizo kaj Ĝenevo. Li multe okupiĝis pri malarmado kaj edukado.

Vojaĝeblecoj: Ĉiu kongresano – kaj ĉiu alia kiu tion demandis – ricevis vojaĝpetilon por akiri oferton pri vojaĝo al Kanado de la Oficiala Vojaĝagentoj de la 69a UK. Tiu agentejo troviĝas en Vankuvero kaj proponas plurajn servojn al kongresanoj: havigo de vojaĝbiletoj, asekuro, lupreno de aŭtomobiloj kaj ĉiaj vojaĝrilataj bezonoj. Ĝi funkciigos sian propran budon dum la UK por servi kongresanojn dum la kongresa semajno. Pro sia pasintjara sperto pri multe pli granda kongreso en la sama loko, la agentejo havas bonan eblecon negoci la plej favoran vojaĝon laŭ la unuopaj petoj de kongresanoj. Necesas, tamen, sendi la petilon **kiel eble plej frue**. Se mankas al vi formularo, kontaktu la Centran Oficejon.

Antaŭkongreso en Montrealo: La Dua Bulteno por la Oficiala Antaŭkongreso ĵus aperis. La organizantoj decidis plilongigi la unuan kotizperiodon ĝis la fino de marto, poste la kotizo altiĝos al \$Kan 275. La prezo por studentoj estos \$Kan 242 kaj por mempri-zorgantoj \$Kan 165. Aliĝiloj estas haveblaj de la CO aŭ de: Antaŭkongreso en Montrealo, 10617 Oscar, Montréal, Québec, Kanado H1H 5J8.

Fakaj asocioj: La sekvaj fakaj asocioj anoncis sian deziron havi kunsidon dum la 69a UK: BEL (Bahaa-noj); EGLI (Go-ludantoj); ELF/AREK (Filatelistoj/Kolektantoj); FAT (Filozofoj); IFEF (Fervojistoj);

IKUE (Katolikoj); ISAE (Sciencistoj); KELI (Evangeliistoj); MEM (Pacistoj); PEM (Mormonoj); SEL (Skoltoj); UMEA (Medicinistoj); UALE (Artistoj); VEK (Veteranoj). Sekretarioj de menciitaj fakaj asocioj, kiuj volas kunsidi en Vankuvero, kontaktu tuj la konstantan adreson.

Glumarkoj: La bela, dukolora glumarko pravigeble bone disvendiĝas, sed ankoraŭ eblas mendi stokojn. Prezo por 100 ekz.: 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

Statistiko: Ĝis la mezo de marto aliĝis 531 kongresanoj el 48 landoj. En la unua loko estas Usono, de kie venas kvarono de la ĝisnunaj aliĝoj. La postajn lokojn okupas Kanado, Francio, Britio, Nederlando kaj FR Germanio. Estas notinde, ke estas tiom multe da aliĝoj el Brazilo, Hungario kaj Aŭstralio, kiom el Italio kaj, ke el Bulgario estas nur 2 aliĝoj malpli ol el Belgio. Aliaj menciindaj landoj estas Japanio kaj Svedio, kiuj estas bone reprezentitaj inter la aliĝintoj.



Ankaŭ en Vankuvero mem eblas ĝui naturbelajojn kaj sperti la ravan geografian situon de la urbego.

Renkontiĝoj, kongresoj seminarioj, kunvenoj, kursoj...

Tutjare

Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna kaj Smoljan (Pisanica), Bulgario (Internacia Esperanto-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

Internacia FERIA Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) tra la tuta jaro organizas diversgradajn Esperanto-kursojn, studsemajnojn, prelegojn ktp.

Internacia Esperanto-Lernejo en Bydgoszcz kaj Toruń, kaj aliaj Esperantaj turismaj aranĝoj, Pollando ("Esperantotur", ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz) havas diversajn instruajn kaj feriajn aranĝojn tra la tuta jaro.

Turismaj semajnaj restadoj en Istanbul kaj Bursa, Turkio (Matur Turizm, Esperantlingvaj servoj, İnönü Caddesi 15/1, Bursa)

Aprilo

01-07 Renkonto de Infanoj, Baugé, Francio (Esperanto-Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)

06-08 62a Germana Esperanto-Kongreso, Kassel, FR Germanio (W. Wiegand, Am Beerenberg 7A, D-3500 Kassel 1)

06-08 Junulara Esperanto-Renkonto, Kecskemét, Hungario (Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapest)

06-10 Renkontiĝo "Fervojista Printempo", Tarnowskie Góry, Pollando (Esperantotur, Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

13-15 79a Skota Esperanto-Kongreso, St. Ninian's, Crieff, Britio (R. Calder, 92 Liberton Brae, Edinburgh, EH6 6LB)

13-15 Svisaj Esperanto-Tagoj, Unterägeri, Svislando (D. Weidmann, Scheuchzerstr. 58, CH-8006 Zürich)

14 Zamenhof mortis en 1917

17-23 TEJO/KER Seminario "Neperforta solvado de konfliktoj", Rimini, Italio (TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

18-23 8a Junulara Festivalo de Itala Esperantista Junularo, Rimini, Italio (IEJ, C.P. 210, I-56100 Pisa)

20-23 Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo, "La homo en la naturo", Bennekom apud Arnhem, Nederlando, (G. Gerritse, Meijhorst 17-55, 6537 KE Nijmegen)

20-23 8a HEJS-Tendaro "Esperanto kiel alternativo", Córdoba, Hispanio (Hispana Esperantista Junulara Sekcio, Apartado 611, Córdoba)

21-23 4a Literatura Forumo "Kien la Esperanto-poezio?", Lausanne, Svislando (Literatura Foiro, CP 33, CH-1211 Genève 8)

21-24 39a Kongreso de SAT-Amikaro, Draguignan, Francio (SAT-Amikaro, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris)

24-28 Simpozio "Strategiaj demandoj de la Esperanto-Komunumo", Varsovio, Pollando (Esplorkleriga Centro de PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)

26/05-03 Seminario por Grupgvidantoj, Kazimierz Dolny, Pollando (Jan Koszmaluk, ul. Zwirki i Wigury 97/99 p511, 02-089 Warszawa; Franz Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1, FR Germanio)

27/05-01 12a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio, Pollando (Akademickie Centrum Interlingwistyczne, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa)

Majo

01-03 10a Renkontiĝo de Esperanto-Junularo, Bosanska Krupa, Jugoslavio (Esperanto-Junularo de Bosnio kaj Hercegovino, Vase Pelagića 8/1, YU-71000 Sarajevo)

03-06 17a Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj, Yaizu (Sizuoka), Japanio (Esperanto-Domo, Tōkyō-to, Sibuyaku, Yoyogi-san-tyōme 46-17, Sone-biru-502, 151 Japanio)

04-06 Kongreso de Eŭropa Klubo, Antwerpen, Belgio (Eŭropa Klubo, Poŝtkesto 3, B-1040 Bruxelles 26)

04-06 Plurlanda Renkontiĝo, Lindau, FR Germanio (Bavara Esperanto-Ligo, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)

04-07 Markola Kongreso 1984, Boulogne-sur-Mer, Francio (M.J. Liné, 34 rue de Beaurepaire, F-62200 Boulogne-sur-Mer)

10-14 7a Turisma Renkontiĝo en Ercmontaro, Johanngeorgenstadt, Germana DR (Rudolf Eichler, Hermann-Mattem-Str. 21, DDR-9430 Schwarzenberg)

11-13 Sveda jarkongreso 1984, Skövde, Svedio (Gunnar Olsson, Slingvägen 12, S-541 40 Skövde)

11-13 23a Kultura Semajnfino, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

12-18 36a IFEF-kongreso Slančev Brjag (apud Burgas), Bulgario (IFEF-Kongreso, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofio)

16-20 Internacia Renkontiĝo Junulara, Oslo, Norvegio (Norvega Junularo Esperantista, Fr. Frøknes v.2, N-3506 Røyse)

18-28 Seminario-Feriado, Velingrad, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofio)

19-20 Kongreso de FLE, Bakkeveen, Nederlando (B. De Wit, Leidsevaart 52, 2114 AD Vogelenzang)

19-25 Ferio-Semajno de TANEF, Dorf Tirol, Italio (TANEF, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando)

21-27 Ĉebalta Esperanto-Printempo, Mielno, Pollando (PEA, Pf. 30, PL-75-950 Koszalin)

25-28 68a Brita Kongreso de Esperanto, Weston-super-Mare, Britio (Philip C. Willey, 4B Highfield Drive, Portishead, Bristol BS20 8JC)

26/06-03 Studa Tendara Semajno, Hall-Eerbeek, Nederlando (FLE, Vlasdonk 1, 1112 JD Diemen)

31/06-03 Mediteranea Konferenco de Esperantologio "Leksikografiaj aspektoj de Esperanto", Vilafranca del Penedés, Hispanio (Literatura Foiro, CP 33, CH-1211 Genève 8, Svislando)

Junio

01-10 Esperanto-Ŝakseminario, Pisanica, Bulgario (Internacia Esperanto-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

08-12 76a Franca Kongreso de Esperanto, Bourges, Francio (UFE, 4bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

08-17 2a Luda Seminario Esperantista, Goldenstedt, FR Germanio (Eckhard Bick, Fasanenweg 11, D-5300 Bonn)

21-30 52a Kongreso de Blindaj Esperantistoj kaj Festivalo de Itala Kulturo, Tirrenia (Pisa), Italio (Michela Lipari, Via Tivaroni 5, I-00143 Roma; brajle: Daniela Bottegoni, Via Rismondo 1, I-60123 Ancona)

- 23-24 Labortagoj en la bieno de UEA, Aspremont, Francio (J.P. Cavelan, 165 chemin du Saquier, St. Isidore, F-06200 Nice)
- 29/07-06 Somera Esperanto-Universitato, Gyula, Hungario (TIT, Békésmegyei Bizottsága, 48-as u. 1, H-5601 Gyula)
- 30/07-07 Konferenco de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, Klagenfurt, Aŭstrio (U. J. Moritz, Im Römerfeld 44, D-5180 Eschweiler, FR Germanio)

Julio

- 01-28 Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Rekrea, Parizska 28, CS-116 09 Praha 1)
- 01-22 Prelegoj kaj Kursoj, Baugé, Francio (Esperanto-Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 04-13 Somera Esperanto-Lernejo, Tjentište, Jugoslavio (Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, V. Pelagića 8/1, YU-71000 Sarajevo)
- 07-11 44a Hispana Kongreso de Esperanto, Sevilla, Hispanio (LKK, Sol 75, Sevilla 3)

Almenaŭ en Eŭropo julio kaj aŭgusto estas la sezono de grandaj moviĝoj kaj vojaĝoj: Biciklista karavano en Debrecen (Hungario) dum la pasintjara TEJO-Kongreso



- 08-17 Renkontiĝo Naturamika, Abaliget-Pécs, Hungario (Departementa Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 08-19 ICEM-Esperanto-renkontiĝo, Languimberg, Francio (P. Poisson, 239 rue V. Hugo, Saint-Cyr-sur-Loire, F-37100 Tours)
- 13-20 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Swanwick, Britio (LKK Swanwick, Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF)
- 14-19 21a Kongreso de ELNA kaj 3a Tutpacifika Esperanto-Kongreso, Portland, Oregon, Usono (Jim Deer, 11905 SW Settler, Beaverton, OR 97005)
- 14-20 Oficiala Antaŭkongreso de la 69a UK, Montrealo, Kanado (L. Labelle, 10617 Oscar, Montréal, Que. H1H 5J8)
- 14-21 6a Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI, Hamburgo, FR Germanio (Hella Lanka, Grünwaldstr. 2, D-2000 Hamburg 52)
- 15-21 14a Amikeca Kongreso, Santiago de Compostela, Hispanio (Pierre Delaire, B.P. 2002, F-45010 Orléans, Francio)

- 15-22 Kongreseto de Kastora Klubo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 15-25 Festivalo de Esperantistoj-Ŝakistoj, Târgoviște, Bulgario (BEA, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 16-27 Familia Komputista Marborda Ripoztendaro, Rab, Jugoslavio (Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario)
- 21-24 Kooperativa Renkontiĝo, Plovdiv, Bulgario (Kooperativa Sekcio de BEA, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 21-27 10a Turisma Semajno, Ĉingov (apud Spišská Nová Ves), Ĉeĥoslovakio (Peter Pavuk, Jilemnického 17/9, CS-052 01 Spišská Nová Ves)
- 21-28 69a Universala Kongreso de Esperanto, Vankuvero, Kanado (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
- 22/08-05 Kursoj, Baugé, Francio (Esperanto-Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)

26 La Unua Libro de Esperanto aperis en 1887.

- 27-31 Renkontiĝo de la SAT-junulfako, Villandraut (apud Bordeaux), Francio (Jean-Luc Bérard, 10 rue Maryse Bastié bât C n.18, Grand Parc, F-33300 Bordeaux)

Aŭgusto

- 01-08 57a Kongreso de SAT, Bordeaux, Francio (Léo Robert, 11 rue des frères Lumière, F-33150 Cenon)
- 01-21 Junulara Esperanto-Brigado, Pleven, Bulgario (BEA, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 02-10 Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Herend, Hungario (Ernö Csiszár, Kulich Gyula u. 25, H-8100 Várpalota)
- 05-19 Esperanto per Slojdo, Baugé, Francio (Esperanto-Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 10-20 Junulara Tendaro "Nekonataj kulturoj", Insulo de Juneco, Jugoslavio (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
- 12-17 Seminario pri moderna Cseh-metodo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

- 12-19 4a Franc-Germana Seminario, Le Havre, Francio (JEFO, 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 12-19 Renkontiĝo de Orientlandaj Esperantistoj, Murree, Pakistano (Matur Turizm, İnönü Caddesi 15/1, Bursa, Turkio)
- 14-21 18a Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, Škofja Loka, Jugoslavio (ILEI, CP 22, I-54100 Massa, Italio)
- 15-28 Feriado "Esperanto Hejme", Międzygórze, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)
- 15-31 Esperanto-Seminario, Borima, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofio)
- 17-24 Tagoj de Kanto-Humuro-Danco, Istanbul, Turkio (Matur Turizm, Esperantlingvaj Servoj, İnönü Caddesi, 15/1, Bursa)
- 18-25 22a Pola Esperanto-Kongreso, Szczecin, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, PL-00-013 Wrszawa)
- 19/09-02 Renkonto de Blindaj Esperantistoj, Baugé, Francio (Esperanto-Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 20/09-01 Junulara Biciklado tra norda Germana DR (Ronald Schindler, W.-Pieck-Str. 44, DDR-2090 Templin)
- 23-28 17a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, P.F. 499, YU-41000 Zagreb)
- 25-26 6a Seminario de la Pacsekcio de PEA, Grodziec, Pollando (PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)
- 31/09-02 Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko "Perspektivoj de la monda nutraĵproduktado", Brno, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1)

Septembro

- 01-09 Renkontiĝo de naturamikoj kaj vegetaranoj, Dudince, Ĉeĥoslovakio (Ernesto Váňa, CS-962 71 Dudince)
- 01-14 20a Esperantista Feriado "La Ora Pola Aŭtuno", Międzygórze, Pollando (PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)
- 04-11 Naturamika Esperanto-Renkontiĝo, Zäzwil, Svislando (E. Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel)
- 07-09 Trilanda Renkontiĝo, Treviso, Italio (I. Amico, via Bainsizza 2, I-31100 Treviso)
- 08-15 55a Itala kongreso de Esperanto, San Pellegrino, Bergamo, Italio (IEF, via Villorresi 38, I-20143 Milano)
- 09-16 7a Semajno ĉe Mediteraneo, Sète, Francio (Espéranto, 5 rue docteur Raux, F-34000 Montpellier)
- 14-21 Kuirarta Konkurso, Bursa, Turkio (Matur Turizm, Esperantlingvaj Servoj, İnönü Caddesi 15/1, Bursa)
- 15-22 Pola Fervojista-Kongreso, Tarnowskie Góry, Pollando (Esperantotur Pollando, Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

Oktobro

- 12-14 20a Kataluna Kongreso de Esperanto, Olot, Hispanio (Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat de Correus 32 318, E-Barcelona)
- 13-14 3a Kadrokurso pri Esperanto-Turismo, Liège, Belgio (Esperantotur Benelukso, Montoyerstr. 37 B 24, B-1040 Bruxelles)
- 19/12-04 Karuselvojaĝo Eŭropo-Azio tra preskaŭ 20 landoj (Esperantotur Benelukso, Montoyerstr. 37 B 24, B-1040 Bruxelles)

- 22-28 Junulara Seminario, Smoljan, Bulgario (Internacia Esperanto-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Novembro

- 30/12-02 Festivalo de Filmo kaj Video, Poreč, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, P.F. 499, YU-41000 Zagreb)

Decembro

- 10 Tago de Homaj rajtoj
- 14-16 Esperanto-tagoj, Krakow, Pollando (Esperantotur Pollando, Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 15 Zamenhof naskiĝis en 1859
- 28/01-02 Vintra Esperantista Ferio, Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)



Lorjak sukcesas en sia neimagebla ludo

Iluzioj, Lorjak (pseŭd.). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 184p. 20cm. ISBN 963 571 082 8. Prezo: 18,00 gld.

"Ĉu la vivo estas monstraĵo, aŭ neimagebla ludo?" Jena demando leviĝas fine de la titolnovelo de la kolekto *Iluzioj*. "Ludo", respondas Lorjak nerekte per dekopo da rakontoj. Kelkajn liajn vivoludojn eble la romanoj de Lorjak (*Retoj*, *Transe*, *Neologisme*, *Regulus*) jam montris, sed la noveloj prezentas pruvojn pli konvinkajn. La romanoj tiom plenas de fantazio, turniĝoj kaj surprizoj, ke ili foje lacigas la leganton dum la tuta daŭro. En kelkpaĝa rakonto, aliflanke, la aŭtoro kapablas perfekte subteni fantazion, humuron kaj stilon.

Antaŭ ĉio Lorjak celas amuzi. Alion li kutime nek pretendas nek promesas. Ke li fakte liveras multe pli ol li promesas – jen sendube unu el la kialoj de lia sukceso. En verkaĵo de Lorjak ĉefe gravas la intrigo. Ĝi preskaŭ ĉiam kunportas la neatenditan finon, lerte preparitan kaj preskaŭ ĉiam efektive surprizan. Oni ne atendu de Lorjak plene disvolvitaĵojn karakterojn, frappe originalajn scenejojn aŭ fajnajn perceptojn. Per malmultaj vortoj li fiksas la karakterojn sufiĉe diferencajn de stereotipaĵoj, por ke ili restu memoreblaj. La scena fono varias – franca provinco, Parizo, San-Francisko, orienta insulo – kaj bildiĝas klare sed ne tiel forte, ke ĝi distras nin disde la intrigo mem. Rilate normalan vizion, oni povas aserti, ke por Lorjak estas nenio sankta: li scias ridigi nin pri seksatenco, pri memmortigo, kaj, en rakonto kiu titoliĝas ĝuste "Malmorale", eĉ pri murdo. Trafe ja li satiras plurajn ecojn de la ĉi-epoka homo: la emo ŝajni kaj imponi, la troa fido je maŝinoj, unuvorte la iluzioj. Sed rimarkindas, ke kiam en unu rakonto Lorjak

celas, pli ol ludon, instruon, li ne plene sukcesas. "Simipagag'", kun la zoologo Sam Enof kaj liaj verdaj papagoj, certe iel alegorie aludas movadajn eventojn. Sed sen memstara intrigo nek klaraj indikoj pri kio ĝuste satiriĝas, la rakonto povas nek amuzi nek informi.

Komence, Lorjak lokas nin mezmeze en iun konatan problemon de la ĉiutaga vivo. Tiam, pere de neverŝajnaj koincidoj, li iom post iom kondukas nin el la ĉiutago al io nekonata. Lorjak tikle memorigas al ni, kiel proksime niaj banalaj vivoj tanĝas allogajn sed danĝerajn aventurojn.

Tamen ne la tuta ĉarmo de Lorjak konsistas en fantazio. Alia parto de lia arto estas stilo. Temas nur parte pri lia lerteco ĉiam elekti la konatan "ĝustan vorton" por ĉiu situacio. Plie gravas lia atento, ke la lingvaĵo neniam stagnu aŭ banaliĝu aŭ dormu. Ĉu per frapa kunmetaĵo ("gluti mistuben"), ĉu per beletra kalemburo ("Akro, kiel de vi l' revo"), ĉu per arta enĉenigo de frazeroj, ĉu per mil aliaj truketoj, Lorjak agrable spicas ĉiun frazon.

Strangaĵo de ĉi tiu eldono estas, ke unu rakonto aperas en franca traduko, alia en du tradukoj, kaj franca kaj angla. Kion oni per tio celas mi ne scias. Eble per la tradukoj vi povos komprenigi al neesperantistoj kial *Iluzioj* (ekz., la rakonto "Ŝŝ") igas vin tiel laŭte ridi. Sen ke oni mem emus pretendi fari pli bone, oni sentas la tradukojn iel palaj kaj malpli vivaj ol la originaloj. Ĉiu nepre legu ĉi tiun novelaron por amuziĝi; sed inter la ridoj, rimarku, kiel lerte el Esperanto, en si mem neimagebla ludo, Lorjak scias krei vivantan lingvaĵon.

James F. Cool (Usono)

Kvin vivepizodoj

Viveroj (1934), Alfonso Rodríguez Castelao (1886-1950). El la galega trad. F. de Diego (1934). Santiago de Compostela: Esperanto-Kurso, 1983. 41p. Ilus. 22cm. ISBN 84 300 9126 2. Prezo: 3,60 gld.

Probable la galegan literaturon oni tradukas en tre malmultajn lingvojn, kaj ni povas fieri, ke Esperanto troviĝas inter tiuj. Ankaŭ ĝojigas, ke la elekto falis sur tiel naivan, spontan verkiston kiel Castelao. Oni legas la kvin epizodojn el lia vivo kvazaŭ oni sidus en komforta ĉambro kaj aŭskultus lin rakonti iom melankoliajn memoraĵojn. Kvankam leĝera, la tono impresas pesimisme. Tio ŝajnas kontraŭdira, sed fakte la rakontoj postlasas ian malgajan tamen ne tro pezan senton. Sed en neniu el ili mankas la esprimo de profunda sincero de la aŭtoro: kion li asertas, oni povus ĵuri, ke li vere tion spertis.

Ne necesas diri, ke ankaŭ la traduko el la plumo de F. de Diego ankoraŭ pli akcentas la fluecon de la travivaĵoj. Bedaŭrinde tamen (laŭ mia gusto) troviĝas kelkaj nenecesaj neologismoj. Alie oni povus reko-

mendi la broŝuron kiel legaĵon por lernantoj, konsiderante la simplan kaj facilan prozaĵon. La glosaro (en kiu cetere mankas *submarino*) ne pravigas enmeton de vortoj kiel *hungro* por "malsato". Ankoraŭ pli malsimpatie mi rigardas al *nelge*, kiu eĉ ne rolas kiel mallongigo por "antaŭ nelonge", analoge al *kotopo* por "kaj tiel plu". Zamenhof rekomendis krei novan vorton nur kiam estas neeble aŭ tro neoportune esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Nova traduko el la araba

La rompitaĵoj; Ama romano, Ĝ. Ĥalil' Ĥibran'. El la araba tradukis G. Abraham. Rio-de-Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1981. 107p. 21cm. Prezo: 10,50 gld.

La rompitaĵoj estas romano pri amo malfeliĉa. Ĝus ekkonis junulino la amon ĉe junulo, kaj jen ŝia patro kun svatisto aranĝas por ŝi la geedziĝon kun iu alia... Certasence temo sufiĉe banala, milfoje traktita jam. Sed Ĥibran el ĝi scias verki valoraĵon, ĉefe per sia stilo jam vasta konata (precipe en *La profeto*).

Bejruto estas la scenejo de 12 okazaĵoj; sed iam tiam la verko montras perspektivojn pli vastajn, problemojn pli ĝeneralajn: neforta protesto kontraŭ la tro dependa pozicio de la virino: "Ŝi simbolis la vivon de la Orienta virino, kiu neniam foriris el la gepatra hejmo, escepte se por meti sian kolon sub la jugon de sia edzo..." (paĝo 56); aŭ kiel vortigas ĝin Salma: "Vi povas pensi, paroli kaj agi libere; vi povas skribi vian nomon sur la surfacon de la vivo, ĉar vi estas viro" (paĝo 59).

Entute superregas ia melankolio, nutrita de la konvinko, ke nur malĝojo kune kun amo kapablas valorigi homan vivon.

Plenkore mi povas rekomendi ĉi tiun verkon kiel indan literaturaĵon el lingvo, kiu ĝis nun bedaŭrinde tro malofte reprezentigas en Esperanto: la araba. Al la tradukinto mi nur povas gratuli kaj deziri, se eble, pluajn sukcesojn.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Lingvo kaj maŝino

Homa lingvo kaj komputilo, red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982, 135p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). Mimeo. ISBN 963 8431 26 1. Prezo: 18,00 gld.

El ĉi tiuj dek du kontribuaĵoj al Interkomputo '82, mi provos karakterizi la plej gravajn per unu-du frazoj.

L.G. Abrosimova kaj aliaj priskribas la principojn, laŭ kiuj oni en Soveta Unio nun konstruas ofteco-vortaron de Esperanto. Ĝi estos bonvena eldonaĵo.

Ouyang Wendao donas modelon por sintaksa analizo de ĉinlingvaj frazoj, kiu povus konduki al Esperanto-traduko per komputilo. La karakterizaĵoj de Esperanto ebligas diversmanieran gramatikan reprezenton de la originalo.

Lothar Hoffmann prezentas sian projekton *Sprache 2000*, kiu baze konsistas el "eksplozema" signifovortaro, t.e. provo doni al ĉiuj signifo-nuancoj en ĉiuj eblaj lingvoj po unu kodon, kiun li prezentas kiel "prononceblan vorton". Citaĵo: "Necesas nur cerba diligenteco... provizi ĝin per multaj, multaj vortoj..." – senfina laboro.

Imre Botos montras, kiel oni povas eltrovi, laŭ kiu originalo iu teksto tradukiĝis, sur la bazo de mistradukaĵoj. La komputila helpo konsistas el produktado de eraraj tradukoj pere de kruda programo por permanenta tradukado.

Bruce A. Sherwood skribas pri sia sistemo de prononcosintezo sur bazo de fonemo-paroj. Intertempe ni scias, ke per tiu sistemo eblas krei vere bonan perkomputilan prononcon.

Rudolf-Josef Fischer komparas diversajn metodojn por trovi "similajn signo-vicojn". Ĝia praktika uzo estus, ekzemple, por trovi pacientojn en hospitala arkivo, se la nomo k.s. enhavas skrib-kaj leg-erarojn.

Plejparte temas do pri ĝenerale interesaj artikoloj. Iuj tamen ne atingas seriozan nivelon, kvankam ili estas pensigaj.

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Historia romaneto

Vilaĝo Borovo, Kum Velkov. El la bulgara trad. Asen Grigorov. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 130p. 20cm. ISBN 969 571 115 8. Prezo: 12,00 gld.

Historiaj okazaĵoj fariĝas pli senpere sperteblaj kaj pli rekte memoreblaj, se ili aperas en la vesto de individuaj sortoj. Tio invitas aŭtorojn el la faktoj teksi fikcion. Aŭ, rigardante de la fikcio fakten, eblas diri, ke la literatura fikcio, la prezento de homaj vivproblemoj kaj interhomaj sintenoj, fariĝas pli konkretaj kaj pli realecaj, se ili enkadriĝas en efektivajn faktojn. La jena libro, do, unuflanke temas pri la loĝantoj de la vilaĝo Borovo, kun multaj el kiuj la leganto intime konatiĝas. Ĝi temas pri ilia ĉiutago sed ankaŭ pri ilia socia konsciiĝo kaj konsciiga agado. Aliflanke kaj samtempe, ĝi montras eltranĉe pligrandigitan bildon de tio, kion historilibroj sumigas sub la rubriko "la komunisma leviĝo en Bulgarujo en 1923". La leganto kvazaŭ ĉeestas la formiĝon de laborista kaj kamparana soveto, la proklamon de respubliko, sed ne nur tion, sed ankaŭ la individuan agadon kaj lukton por ĉio ĉi, la dubojn kaj cerbumojn de la movadanoj mem.

Kontraŭe al aliaj libroj lastatempe eldonitaj de HEA, ĉi tiu aperas en traduke kaj prese iom kruda formo. La lingvaĵo ja fluas, sed stumblas kiam necesas traduki ne vortojn sed lingvouzon. Trakontrolo de alilingvano povus multon poluri. HEA pli frue jam sukcesis presi purajn ĉapelitajn majusklojn, sen mane desegnita cirkumflekso kaj sen neforskrapita korektosigno, do kial nun tiel mallerte? Eblas ĝui la libron, sed eble ne donu ĝin al viaj kursanoj.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Por profiti el impona kulturo

Kroatia poezio. Komp. Ivan Krtalić. Red. Spomenka Štimec. El la kroata trad. diversaj. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1983. 296p. 20cm. Prezo: 39,00 guldenoj.

Ŝajnas, ke la kompilinto de ĉi tiu antologio volis impresi nin per la kvanto da kroataj poetoj en la mallonga periodo de la lastaj 150 jaroj. Ne necesas fari tion. Eĉ landoj kun longa literatura tradicio, multjarcenta klerigo de la popolo kaŭze de pli da rimedoj, ne sukcesus prezenti tioman kvanton da bonaj poetoj kaj da bona poezio. Pro tio devis suferi la kvalito. Malpli impona amplekso, sed pli rigora selekto, estus preferinda. Oni devas do unue trakuri la tutan volumon kaj poste elekti la dumlege markitajn pecojn por denova gustumo kaj elĝuado.

Ĉar Kroatio estis dum multaj jaroj subpremata politike, religie, ekonomie kaj kulture, evidente konsiderinda parto de la enhavo temas pri protesta literaturo, ĉefe kontraŭ la turka tiraneco. Tia ekzemplo estas *Haraĉo* de Ivan Mažuranić, el eposo verkita sur historia fono, simila al tiu de *La montara krono* el la naciliberiga batalo de Montenegro. *Penso de la mondo* de Silvije Kranjčević memorigas pri Castro Alves, do pri Victor Hugo, forme kaj enhave. De la sama aŭtoro, *Al sinjoreca kastoro*, fajne ironia, en malfacila redono de klasika metriko kaj la interesa kreaĵo de 'Gaea' por la greka diino de la Tero, formas kune kun *Heronea leono*, temanta pri la fratiĝo inter poeto kaj libero, tri el la plej artaj tradukaĵoj. Tion sammetiano sentas, eĉ ne konante la originalojn, tradukitajn de majstro Josip Velebit.

Tio kondukas la recenzanton al alia manko de la libro: la nivelo de la tradukarto. Ŝajne oni volis doni ŝancojn ankaŭ al novicoj, kiuj tial aperas – kaj ekzemple kakofonias per "fe-koloroj" aŭ trouzo de abortaj rimoj – apud veteranoj, kiel (mi citos nur unu pli, ĉar ĵus kaj bedaŭrinde forpasinta) Ivo Rotkvić. Kiel li sukcesis enmeti en la silaboŝparan *Lunbrilo* de Dragutin Domjanić, kune kun perfektaj rimoj, tiom da ideoj! Aliflanke oni miras, ke Vesna Skaljer-Race, kiu jam tiom ofte gajnis premiojn en Belartaj Kon-

kursoj, trouzas la liberan vortordon de Esperanto en diversaj tradukoj: "al noktaj mi spacoj iras", "nova nun mondo naskiĝas", "nova min lumo tuŝas", "varmaj min kaptas manoj", "al blankaj strebas altoj". Eĉ se tiel en la originalo, ŝi ne devus perforti nian sintakson.

El la pli modernaj poetoj plej impresis min Ivan Goran Kovačić, kvankam nur parto de lia poemo *Kavo* aperas. Prave la bibliografiinto asertas: "En realisme-naturalismaj bildoj li esprimis hororojn de milita buĉado kvazaŭ atingante la inferon de Dante."

Fine ion pri la lingvaĵo: el Zagrebo oni ja povas atendi nenion malpli ol perfektecon. Tamen kelkaj mankoj enŝteliĝis. Kial en la Antaŭparolo de la propra kompilinto "senzibileco"? En *La ŝtonĵetanto* de Antun Šoljan aperas trifoje "malgraŭ" uzata konjunkcie, ŝajne intence, pro iu stilefekto, ĉar poste la traduktinto uzas la ĝustan "kvankam". En *La muzikiloj de majstro* "harfoj" ne ŝajnas preseraro anstataŭ "harpoj". Se ne, necesus gloso, same kiel "orkano" en *La fajra vento* kaj "galgo" krom la propra titolo *La galgisto* – ambaŭ de Miroslav Krleža. Eksplikon bezonas ankaŭ kiu verko de Orcagna inspiris Vladimir Ĉerina verki *Orkanjo*. Kompense Nikola Rašić en *Khevenhiller* de Krleža genie uzis (ĉu li por la unua fojo?) direkto-akuzativon por same, rimante ĝin kun unu el la du solecaj rimvortoj "amen" kaj "tamen".

Nepre aĉetinda verko por profiti el la impona jugoslava kulturo pere de Esperanto.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Laste aperis . . .

Apenaŭ bukedeto... (1971). El la franca trad. Roger Bernard (1907). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (2a eld.). 71p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 4. Poemoj el la franca literaturo, klasikaj kaj modernaj, plus kelkaj originalaj. Prezo: 15,00 gld.

Dolĉa gusto de l' paco, diversaj aŭtoroj. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dan. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1982. 50p. 16cm. Kolekto Hibisko. Tri rakontoj el nuntempa Vjetnamio. Prezo: 3,00 gld.

Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten (1921), Walter Lippmann (1895). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 70p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 8. Germanlingva prilaboro de *Lingvaj respondoj* de Zamenhof, kun komentoj kaj klarigoj. Prezo: 11,40 gld.

Esperanto-grammatikk, Odd Tangerud. Oslo: la aŭtoro, 1983. 97p. 23cm. ISBN 82 991075 0 4. Prezento de la gramatiko de Esperanto por norveglingvanoj, pedagogie kompilita; kun indekso. Prezo: 21,00 gld.

Esperanto lærebok-lernolibro, Jon Rømmesmo. Sen bibliografiaj indikoj (Norvegio): la aŭtoro, 1983. 35 + 6 + 46p. Ilus. Mimeo. 31 cm. 18-leciona elementa lernolibro kun klarigoj en ambaŭ variantoj de la norvega lingvo; kun vortareto kaj ŝlosilo al ampleksa ekzercaro. Prezo: 18,00 gld.

Etulaj aventuroj, Zora Heide (1924). Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1983. 103p. Ilus. 21cm. ISBN 91 7328 388 6. Ok originale verkitaj rakontoj pri la infanaĝo. Prezo: 12,60 gld.

Horizonto de soveta Litovio, red. A. Vaitilavičius k.a. Vilnius: Mintis. Ilus. Mimeo. 29cm. **4a kajero**, 1979. 45p. **5a kajero**, 1980. 49p. **6a kajero**, 1983. 61p. Kolektoj de diversspecaj beletraĵoj kaj artikoloj plejparte pri la literaturo, lingvo, kulturo kaj socio de nuntempa Litovio. Prezo por unuopa kajero: 3,00 guldenoj.

Kongreso en Belgio; memorlibro pri la 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, 1982, red. Marc Vanden Bempt. Leuven: Esperanto 2000, 1983. 141p. Ilus. Mimeo. 21cm. Bunta kolekto de ĉiaaĵoj el kaj pri la Kongreso. Prezo: 9,90 gld.

Latva-Esperanta konversacia vortaro, E. Jaunvalks. Rīga: Avots, 1983. 174p. Ilus. 17cm. Bind. Laŭtema frazlibro kun 13-paĝa resumo de la Esperanta gramatiko. Prezo: 9,00 gld.

Manuale di esperanto, Elio Migliorini (1902). Grosseto: Cooperativa editoriale esperanto, 1980. 159p. 21cm. 12-leciona lernolibro por itallingvanoj laŭ gramatika metodo, kun dudi-rekta vortareto kaj ampleksa enkonduko. Prezo: 10,50 gld.

MEM 30-jara, red. Szilárd Bálint. Budapeŝto: Hungara MEM-Sekcio, 1983. 44p. Ilus. 20cm. Diversaŭtoraj artikoloj pri la historio kaj celoj de Mondpaca Esperantista Movado. Prezo: 3,60 gld.

Mi malamas..., Ken Hajasi (1933). Kioto: L' omnibuso, 1983. 71p. Ilus. 18cm. Kvin originalaj rakontoj, kiuj antaŭe aperis en la japana literatura gazeto *L' omnibuso*. Prezo: 13,20 gld.

Mirakla insulo Baratario, La (1922), Silvio Gesell (1862-1930). El la hispana trad. Klaus Rosenfeld. Soest: Universala Ligo, 1983. 24p. Ilus. 21cm. Verko, kiu kontraŭas la interezoeconomion kaj la nunan monsystemon. Prezo: 4,50 gld.

Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, komp. Germain Pirlot (1943). Oostende: la aŭtoro, 1983 (4a eld.). 18p. Grafikaĵoj. Mimeo. 21cm. Ĝisdatigita, laŭlanda priskribo. Prezo: 2,70 gld.

Tagebuch, Das/La taglibro, Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832). El la germana trad. (1932) Kálmán Kalocsay (1861-1976), Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 20p. Ilus. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Beletro tradukita 5. Dulingva eldono de 24-strofa poemo de la plej granda klasika germana verkisto. Prezo: 6,00 gld.

Technisch-industrielle Normung und Sprachnormung (1923); **La psikoteknika ekzameno pri taŭgeco de maŝinindustriaj lernantoj** (1924), Jakob Schenkel (1892-1980). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 54+27p. Ilus. Mimeo. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 7. Prezo: 12,60 gld.

Verkaro de Ter. Isiguro, Teruhiko Isiguro (1906-1980). Tokio: Zamenhof-Klubo, 1983. 269p. Ilus. 19cm. Bind. Dudek unu diversspecaj beletraĵoj, tradukitaj kaj originalaj, de multjara direktoro de Japana E-Instituto. Prezo: 24,60 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5 %, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19 % por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Japanio:** Fronte al la Centjara Jubileo de Esperanto, la plej influhavaj Esperanto-organizaĵoj de Japanio nomis "Tegmentan Komisionon". Jam la tria kunveno de la Komisiono okazis la 29an de januaro en Kôbe, kun partopreno de Japana Esperanto-Instituto, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, Rondo Harmonia kaj Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto. La venonta kunveno okazos en aprilo.

● La 8an de februaro, antaŭ 45 aŭskultantoj en la 14a Kultura Prelegkunveno de Japana Esperanto-Instituto en Tokio, parolis You Kuanren, vicprofesoro de Teknologia Universitato de Harbin, nordorienta Ĉinio. La temo de la prelego estis "La Esperanto-movado en Ĉinio post la Kultura revolucio". You, kiu antaŭe studis en Japanio, estas unu el la gvidantoj de la loka Esperanto-movado en la ĉina provinco Heilongjiang.

● **Jugoslavio:** De la 30a de januaro ĝis la 3a de februaro Kroatia Esperanto-Ligo okazigis "Kvin tagoj de Bolivio" – sian kvaran aranĝon pri malpli konataj landoj kaj kulturoj. Koncerto de bolivia popolmuziko allogis salonplenan de

1 800 homoj, dum prelegoj de i.a. eksambasadoro, antaŭe akreditita al Bolivio, kaj Tibor Sekelj estis amase vizititaj. Oni krome ekspoziciis boliviajn etnografiaĵojn. Amaskomunikiloj multfoje menciis la peran rolon de Esperanto dum la kvin tagoj. La aranĝo estis eble la unua tia pri Bolivio, ie ajn okazinta, tiel ke la bolivia inform-agentejo petis apartajn raportojn pere de Internacia Novaĵ-agentejo de Nealiancaj Landoj. Pliajn informojn pri la imitinda aranĝaro liveras Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

● **Korea Respubliko:** La 9an de januaro komenciĝis elementaj kursoj de Esperanto en ses urboj de Korea Respubliko. La kursan agadon planis Korea Esperanto-Asocio, dum ĝiaj lokaj filioj realigis la planon. Inter la celoj de la kur-

saro estas organizi novan filion en urbo, kie antaŭe ne estis grupo, kaj plifortigi la landan Movadon. Post la kursoj KEA okazigos sestigantan renkontiĝon aparte por la novaj esperantistoj.

● La 3a Komuna Esperanto-Seminario inter Japana kaj Korea Junularoj okazos ĉi-jare de la 4a ĝis la 6a de aŭgusto en Korea Respubliko. Oni ankoraŭ ne definitive decidis pri la loko, sed ĝi kredeble estos la universitato Danguk en la urbo Ĉonan. Informoj estas haveblaj de Korea Esperanto-Junularo, C.P.O. Kesto 4258, Seoul-100, Korea Respubliko.

● **Brazilo:** Antaŭ nelonge festis la centjaran datrevenon de sia fondo Brazila Spiritisma Federacio (FEB) per inaŭguro de nova sidejo en la ĉefurbo Brazilio. La Federacio ludis kaj ankoraŭ ludas gravan rolon por la brazila Esperanto-movado. Ĝiaj oftaj Esperantaj eldonaĵoj estas inter la teknike plej bele produktitaj.


Fake

● **Libroj:** Ĉe la renoma japana eldonejo Iwanami ĵus reaperis la biografia verko *Zamenhof, la patro de Esperanto* de Saburô Itô, unue eldonita en 1950. Ĉi tiu dua eldono, 275-paĝa, estas aparte

bonvena pro la fakto, ke parto de ĝi estas reproduktita en kelkaj mezgradaj legolibroj. Nun la japanaj lernejoj, kiuj informiĝas pri Zamenhof kaj Esperanto, povas akiri la biografion kaj pli funde konatiĝi kun "la patro de Esperanto". Cetere, ĉe Iwanami siatempe (1975) aperis ankaŭ la libro de Ulrich Lins, *La danĝera lingvo*, kies 50 000 ekzempleroj jam delonge vendiĝis. Ĝia represo verŝajne ne okazas pro la fakto, ke Lins jam reverkis kaj pliampleksigis la libron, kiu unue aperis en Esperanto.

● **Periodaĵoj:** Internacia Kultura Servo, Jugoslavio, anoncis la aperon de *Ovo*, nova internacia revuo por distro kaj amuzo. Oni planas eldoni la revuon precipe por komencantoj ekde septembro ĉi-jare. Oni esperas pri apero ĉiun trian semajnon kun varia enhavo de detektivaj romanoj ĝis bildstrioj. La jarabono estas ĝis la fino de aŭgusto 29 gld., post tiu dato 35 gld.

● **Tradukoj:** Fine de la pasinta jaro aperis ĉe la eldonejo "Scioj" ĉina traduko de *Historio de la lingvo Esperanto* de Edmond Privat (1889-1962). Tiu fama verko kovras la tempon ĝis 1927. Ĝin laste reprenis Internacia Esperanto-Instituto, Hago, en 1982. La 290-paĝa ĉina traduko havas du aldonaĵojn: longa



● **Vjetnamio:** Antaŭ kelkaj monatoj, Esperanto-Klubo de Nhà Văn Hóa aranĝis tutmonatan ekspozicion pri la Internacia Lingvo. Por ni estas aparte interese, ke la ekspozicio dediĉiĝis ankaŭ al la 75-jara jubileo de UEA, kiu okazis pasintjare.

artikolo de la tradukinto Honfan kaj antaŭparolo de Chu Tunan (i.a. vicestro de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Eksterlando). En 1957 aperis ankaŭ japana traduko de ĉi tiu verko de Privat.

● **Universitatoj:** En 1983 oni ekzamenis en la Universitato de Provenco, Francio, 41 studentojn de Esperanto. Sukcesis 29. Dum la nuna jaro la instruadon prizorgas Michel Duc Goninaz kaj Daniel Moirand. La du kursojn sekvas ĉ. 35 studentoj, ankaŭ en lingva laboratorio. La biblioteko de la Esperanto-sekcio havas preskaŭ 700 librojn. Por krei sliparon de tiu biblioteko ĵus dungigis studento por unu monato. La 26an de majo la Esperanto-sekcio okazigos studtagon pri la instruado de Esperanto. Personoj dezirantaj partopreni, eventuale per referaĵo, bonvolu skribi al: Université de Provence, Section d'espéranto, 29 av. Robert-Schuman, F-13621 Aix-en-Provence, Francio.

● **Informado:** Pasintan jaron aperis ĉe Esperanto-Societo de Kôbe la "ŝlosil-simila" japanlingva broŝuro *La semo de Esperanto*. Oni ĵus anoncis, ke jam kvin mil ekzempleroj vendiĝis. Spite al la modesteco de la 50-paĝa libreto, oni sukcesis ricevi ampleksan atenton de ĵurnaloj, radio kaj televido, tiel ke centoj da interesitoj mendis ĝin, samtempe petante pliajn informojn pri kursoj ks.

● **Libroj:** En pluraj movadaj periodaĵoj ripetigis lastatempe la aserto, ke la bonega verko de William Auld *Paŝoj al plena posedo* "estas la plej sukcese vendata libro en la tuta historio de Esperanto". Tio tamen estas troiga malĝustajo, ĉar *Privilegia vojo* de Vilho Setälä jam antaŭ sep jaroj estis vendita en pli ol 20 000 ekzempleroj (la suma eldonkvanto de *Paŝoj*), kaj ĝi ankoraŭ bonege vendiĝas. Cetere, ĉu la vera rekordulo ne povus esti *Fundamenta krestomatio*,

kun siaj 17 eldonoj, kaj UEA nun preparas la 18an? Aŭ, kiel oni kalkulis tiun "rekordon", se ekzistas du eldonoj (1974 kaj 1982) de *Esperanta-rusa vortaro* de Bokarev kun suma eldonkvanto de 140 000 ekzempleroj? Ĉu iu bonvolus esplori pri la vera libro-rekordulo?

Persone

● **Umeda:** De la 12a ĝis la 18a de marto ĉi-jare, s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, faris privatan vojaĝon al Pekino. Dum la restado en la ĉina ĉefurbo, Umeda prelegis al la membroj de Pekina Esperanto-Asocio, interparolis kun la redakcioj de Radio Pekino kaj *El popola Ĉinio* kaj kun la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian. Tamen, la plej ampleksaj konversacioj okazis kun la

funkciuloj de Ĉina Esperanto-Ligo, ĉefe pri la demando de eventuala Universala Kongreso en Pekino en 1986, pri kio la Estraro de UEA devus tre baldaŭ fari definitivajn decidojn.

● **Du Temple:** Fine de novembro kaj komence de decembro 1983, la prezidanto de LKK de la 69a UK en Vankuvero, s-ro W.G. du Temple, faris du semajnajn vojaĝojn tra Kanado, por informadi pri Esperanto kaj la Kongreso. Li sukcesis aperi entute 9 artikolojn en diversaj gazetoj kaj intervjuigis por 4 radiostacioj. Du Temple faris ankaŭ plurajn prelegojn dum la vojaĝo, kiu estis financita el aparta donaco (7 000 kanadaj dolaroj) de Chuck Carson, speciale por informado pri la ĉi-jara UK en Kanado. Antaŭ kelkaj jaroj Carson jam donacis kelkdekon da miloj da dolaroj al Kanada Esperanto-Asocio.

Oficiala Informilo

HEREDAĴO BARDSLEY

Ĉi-poste, sub donacoj, vi rimarkos, ke la Asocian Kapitalon de UEA eniras nova sumo de preskaŭ 8 000 guldenoj el la heredaĵo de Charles Bardsley, kiu forpasis la 24an de decembro 1982 en Oldham, Britio. La forpasinta mecenato estis membro de UEA dum kvindekda jaroj kaj servis ankaŭ kiel delegito kaj fakdelegito en Oldham.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Japanio: Tadcuna Nomura.

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Grégoire Maertens; L. Drèze. FR Germanio: Elise J.F. Woller; Erdmann Fritsch; Helmut Klünder; Richard Schulz; Ruth Paintner-Trumpp; Werner Heinrich; M. von Waldowski. Francio: Jean-Paul

Beau. Japanio: Kyôhei Nakazima; Saburô Yamazoe; Wilhelm Schmid; Takeo Sugano; Tosihide Kuwahara. Kanado: W.G. Du Temple; Olga Du Temple. Norvegio: Pepita de Caspary. Nov-Zelando: Jeannie Wilson. Svedio: Åke Blomberg; Einar Rasmussen; Jim Hornö; Karl G. Lennart Lagerkrantz; Olle Olsson; Tore Fors. Usono: Frederik J. Belinfante; Charles R.L. Power; Eugene H. Thompson Jr.; Bernice Garrett; Thomas H. Goodman; Humphrey Tonkin; Ken Thomson; L.A. Walther; Milton O. Brown; James Parkerson; Pauline Ledeen; William Solzbacher.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. FR Germanio: Christie Spruch. Kanado: Petro Collinge. Usono: Alex Tate; Alberta Seabold Casey. **SUBTENANTOJ** (minimуме \$25): FR Germanio: Hans-Dietrich Quednau. Francio: Pierre Poly. Japanio: Tadao Yosida. Kanado: Edward William Woodruff; W.D.B. Hackett. Nov-Zelando: Jeanie Wilson. Usono: Cleo J. Fort; Donna R. Stitz; Joan Feingold; John Futran; T. Krajewski; Lura R. Chapman; William J. Mets; M. kaj H. Leonard; Mary Murray; Philip R. Driscoll; Roy McCoy; Yul Balbin. **AMIKOJ** (minimуме 10\$): Aŭstralio: Oakleigh Esperanto Group. FR Germanio: Josef Merz. Kanado: Crawford Baker. Meksikio: Julie L.

Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



Éva Tófalvi & Oldřich Kníchal

Kiuĵ semas plorante...

Nova originala romano en Esperanto! Ĝi gajnis la prestiĝan Premion Raymond Schwartz en 1980. Ĝi estas psikologie teksita intima rakonto, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu erarvagas sub influo de la faŝisma ideologio. En tre sukcesa grafika prizorgo de Franko Luin; kontraŭ aparte favora prezo:

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8.
Prezo: 15,00 gld.



Regal. Norvegio: Alf Reidar Grødaland. Usono: Audrey Janisen; José Hackenberg; Jack K. Lesh; Lydia Tabor; Rudolf C. Couppez; Vivi Couppez.

PATRONOJ DE TEJO 1984

Francio: Daniel Doye; Marcel Jullien; René-Jean Marmou. Hispanio: Esperanto-Grupo de Valencia; Miguel-Angel Altuna Aspiazu. Italio: Carla De Lorenzi; Clara Gubbioli Carioli; Sergio Martina; Giuseppina Picciotto De Vita. Japanio: Takasi Agou; Yuri Sakamoto. Nederlando: Internacia Esperanto-Instituto; Stefan MacGill.

DONACOJ 1984 (Gld.)

ĝis la 15a de marto

ASOCIA KAPITALO: Britio: Heredaĵo C. Bardsley 7 960,85.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Francio: B. Wick 44,40. Italio: Nino Vessella 240,88. Norvegio: K. Gustavsen 19,48. Sumo ĉi-jara 3 154,76.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 34,75. Nederlando: S.P. Duin 50,00. Svedio: E. Brenander 76,75. Sumo ĉi-jara 1 211,32.

ĜENERALA KASO: Aŭstralia Esper-


anto-Asocio 28,00. Belgio: G. Pirlot 19,00. Finnlando: A. Linja 15,66; E. Mänty 27,14. Diversaj malgrandaj: 20,71. Sumo ĉi-jara 366,73.

FONDAĴO KER DE TEJO: Eŭropa Junulara Fondaĵo: 5 715,39. Eŭropa Konsilio: 11 691,50 Sumo ĉi-jara 17 406,89.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: Sino R. Paintner-Trumpp 451,00. Sumo ĉi-jara 900,96.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

tibor sekelj



elpafu la sagon

uea 1983

Aperis nova volumo en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA. Temas multrilate pri unika verko, kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:

Tibor Sekelj

ELPAFU LA SAGON

el la buŝa poezio de la mondo

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187 paĝoj, 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝurita); 36,00 gld. (tole bindita), plus sendokostoj. Kutima triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

Nekrologoj

SAMUEL ELLYARD forpasis la 16an de januaro en Aŭstralio. Li funkciis kiel la kasisto de Aŭstralia E-Asocio.

PAULO DE OLIVEIRA LUDKA (1925-1984), laboratoriisto, mortis antaŭ nelonge en Rio-de-Janeiro, Brazilo. Li estis fakdelegito kaj membro de UEA ekde 1948.

HEINRICH MATZINGER-BENZ (1897-1984) mortis la 11an de januaro en Zuriko, Svislando. Jam 70-jara li lernis Esperanton kaj en 1965 aŭtoris kun J.J. Sturzenegger la lernolibron *Unesteno, universala Esperanta stenografio*.

ANDREO RAJSKI (1911-1984), ekonomikisto, mortis la 6an de februaro en Varsovio. Li lernis Esperanton en 1926 kaj funkciis kiel vicprezidanto kaj prezidanto de Pola Esperanto-Asocio de 1954 ĝis 1961, kaj komitatano kaj estrarano de UEA de 1957 ĝis 1962. Li estis la pre-

zidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 44a Universala Kongreso en Varsovio en 1959. Li tradukis poeziaĵojn de polaj klasikuloj en Esperanton kaj verkis la artikolojn pri Esperanto kaj Zamenhof por granda pola enciklopedio. Li estis multjara ano de Veterana Sekcio de PEA.

KENNETH A. SLY (1916-1984), instruisto, forpasis en Letchworth, Britio, kie li estis la fakdelegito pri SOS-aŭtoserĝo, ŝako kaj radio-amatorismo. Li havis ampleksajn radio-kontaktojn kun esperantistoj tra la tuta mondo. Li estis membro de UEA de post 1942, membro-subtenanto dum 30 jaroj kaj plurjare ankaŭ membro de Societo Zamenhof.

MARTHA WALKER (1905-1983), ĝardenistino, forpasis la 24an de junio pasintjare en Napa, Kalifornio, Usono, kie ŝi dum multaj jaroj servis kiel delegito de UEA. Tre aktiva, ŝi gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj verkis senombrajn artikolojn. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj membro de Societo Zamenhof.

Nova adreso post 1984 04 01 de A.A.F. Tebbenhof estos: Pepergasthuis, Peperstraat 22/6, 9711 PE Groningen, Nederlando.

Okjara Zoja Janeva ŝatas korespondi kun samaĝuloj: Al. Stambolijski N. 5, Rakitovo, Okr., Pazarĝiški, Bulgario.

Vivo de Zamenhof: La klasika biografio, verkita de d-ro Edmond Privat. Eldonita de The Esperanto Publishing Company. 133 tekstpaĝoj. 15 fotoj. 5a eldono. Bindita. Aĉetu de la Libroservo de UEA (prezo: 18,90 guldenoj) aŭ de via enlanda libroservo.

Por kompletigi la originalajn kaj tradukitajn verkojn de **Petro Poliŝĉuk**, por posta eldono, uzbekaj esperantistoj petas helpon: Vladimir Masalkin, mas-siv Junusabad, kvartal 8, dom 13, kv.28, SU-700093 Taŝkent-93, Uzbekistan, Soveta Unio.

1. **Facilaj dialogoj:** La sukcesa helpilo por lerni/lernigi konversacion. Afrankite: 28 frankojn. 2. **Por plivastigi nian movadon:** Praktikaj konsiloj kaj utilaj rekomendoj ofte laŭdataj. Afrankite: 28 frankojn. – Ĉe libroservoj kaj Ligue Française "Pro UNESCO", 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 Ĉ Paris.

Apologias al ĉiuj siaj geamikoj Henri W. Appel (RSA) pro stagnita korespondado. Cirkonstancoj ne lasis tempon por skribi. Espereble li baldaŭ sendos leterojn.

Aĉetsekcistaro (elektromotorfabriko), 47-jara, serĉas Esperante parolantan vendiston de varoj/pecoj, bezonataj por nia fabrikado. Ni povas praktiki Esperanton ĉe komerca korespondado. Franz Braun, Hornisgrindestr. 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio.

George Partlow kaj Linda McCargar de Juneau, Alasko (Usono), ĝojas anonci la naskiĝon de Michael John McCargar-Partlow [Majkl] je la 26a de februaro 1984 (2,45 kg!).

Kelkajn korespondadojn kun s-ino d-ro Conterno-Guglielminetti havas d-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38/I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando. Interesatoj povos ricevi kopiojn sendante 2 internaciajn respondkuponon.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Interŝanĝu bildlibrojn por infanoj! Sed, ne tuj rekte sendu ilin al ni. Antaŭe skribu, por pli bona kaj pli utila rikolto por ambaŭ, al Esperanto-Rondo en Ikeda: Kawamura-kata, Muromati 5-13, Ikeda-si, 563 Japanio.

E. Lacy (55-jara, ano de la rusa ortodoksa eklezio) deziras korespondi kun eŭropaj samkredantoj pri orienta ortodoksa kristanismo. – Box 1446, Houston, TX 77251-1446, Usono.

Leningrada Esperanto-klubo "Espero" serĉas kolektivajn aŭ individuajn korespondantojn en sia ĝemelurbo Manchester, Britio. Adreso: a/k N 360, SU 191028 Leningrad, Soveta Unio.

Olimpikaj ludoj viziteblas spirite: skribe aŭ interŝanĝante sonbendojn. Gastig-urba letervespero okazos maje: Esperanto, 1888 Century Park East 1000, Los Angeles, CA 90067, Usono.

Filatela Kooperativo serĉas kontaktojn kun oficialaj poŝtoŝefoj, kluboj kaj asocioj. Adreso: Maza 1448, RA-1240 Buenos Aires, Argentino.

Pri libroj, muziko kaj sporto ŝatas korespondi 22-jara irana fraŭlino: Katrin Sakisian, Dr. Fatemi Av., Kadj Av. First alley No. 16, Tehran, Irano.

Savanto estas movado por paco, kiu 93-procente garantias realigi la mondan pacon ĝis la jaro 2000. Se vi deziras registri kiel savanto-batalanto, aĉetu savantnumeron. Ĉiujn informojn donas Nedeljko Gavriĉ, Biskupići, YU-71300 Visoko, Jugoslavio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

12- kaj 13-jaruloj serĉas korespondamikojn: Klubo de internacia amikeco "Verda stelo", ZŠ Školní 1510, CS-74258 Příbor, Ĉeĥoslovakio.


Irana esperantisto deziras korespondi. H.R. Gahseme, Saadi Street, Sohail Ally 3, N-ro 22, IR-41536 Rasht, Irano.

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

**Nova
plenkolora
afiŝo
havebla!**

Mendu ĉe la
Libroservo
de UEA:
13,50 (16,07 por
Nederlandanoj)
gld. por 10
ekzempleroj.
Triona rabato
ekde 30 ekz.

Formato
29 × 42 cm.



Malkovru la du duonojn de la nova **kontakto**

Unu duono havas nekomplikan lingvaĵon, facilan kaj taŭgan por novaj esperantistoj. Du duonoj havas stimulan enhavon – interesajn artikolojn el la tuta mondo, kiujn verkas plejparte gejunuloj, pri aktualaj temoj: ekzemple en 1984: Religio, Kooperativoj, Homo kaj maŝino, Krimo kaj Esplorado.

Membroj de UEA/TEJO malpli ol 26-jaraj kaj Patronoj de TEJO ricevas la revuon *Kontakto* sen plia pago. Aliaj povas aboni ĝin. Membriĝu aŭ abonu nun ĉe la kotizperantoj de UEA! Petu senpagan specimenon de ili aŭ de la Centra Oficejo.

Kontakto estas abunde ilustrita, en dukolora preso. Ĝi aperas ses-foje jare: jen dek du duonoj kiujn vi nepre malkovru!



Spite la altan prezon, preskaŭ du mil esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitatis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurusu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lasta milo de la posedantoj!

esperanto
en
perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

”Kapablo trafe kaj klare prilumi la kernon de problemoj”

William Auld

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendokostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

ZORGAJ KRITIKAJ RECENZOJ
permesas aserti jam ke la verko

Don Juan' Tenorio

tradukita de L. Mimó, enhavas neniun mal-regulaĵon aŭ eraron en la vortfarado, la konjugacio, la komparacio kaj la posesivo, la partoj esencaj de la lingvo, kio verŝajne estas tute senprecedenca en la Esperanta literaturo.

NIKOLAJ RYTJKOV

DEK OK MAJSTROVERKOJ (DE ŜEKSPIRO ĜIS AULD) EN MAJSTRA INTERPRETO DE GRANDA AKTORO. SUR GRANDFORMATATA DISKO (24,00 GLD) AŬ SUR KASETO (21,00 GLD). MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA!

Elektitaj Eroj



Vi emas en internacia medio praktiki aŭ lerni Esperanton?

Vi deziras konatiĝi kun historiĉa regiono de Francio?

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO KASTELO GRÉSILLON

havas proponon por vi:

De la 1-a ĝis la 22a de julio



Prelegoj, kursoj, konversacioj,
malkovro de la regiono

Fine de tiu periodo, la 21an kaj 22an de julio, matene: **TRIALOARA RENDEVUO**, organizata de LF-Koop

De la 22 de julio
ĝis la 5a de aŭgusto



Kursoj, trinivelaj, por internacia ĉeestantaro,
distras vesperoj, vizitoj al la ĉirkaŭaĵo

De la 5a de aŭgusto
ĝis la 19a de aŭgusto



Inicaj kaj progresigaj kursoj pri diversaj artoj,
ekskursoj en la regiono kaj vizito al artmetiejoj

De la 19a de aŭgusto
ĝis la 3a de septembro



Renkonto de blindaj kaj neblindaj esperantistoj
kultura programo, kursoj, diversaj distraĵoj

Informoj kaj aliĝoj ĉe: Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon,
F-49150 Baugé, Francio

La vasta abonantaro de **INTERNACIA KOMPUTADO**:
helplaboristoj kaj instruistoj, mezlernejoj kaj dom-
mastrinoj, "eĉ" komputistoj jam tutmonde legas la plej
novan numeron pri **RETOJ. KAJ VI?** La kvaronjara,
kolorkovrila, 64-paĝa magazino

INTERNACIA KOMPUTADO

tutjare aboneblas jam en trideko da landoj, ekzemple
(parenteze la abonprezo en nacia valuto): Brita EA (5),
ELNA (10), Finna Libra Mendoservo (45), IKS (700),
Korea EA (7 000), LF-KOOP (18), Paderborna EC (22),
Sonorilo (380), Sveda Eldona Societo (60), UFE (70),
UEA al komp-i (24).

FERIADO en MALTO

meze de Mediteraneo

Post la sukcesa Unua Turisma Semajno, okazinta en
1981, Esperanto-Societo (Malta) organizos



LA DUAN INTERNACIAN TURISMAN SEMAJNON EN MALTO

de la 4a ĝis la 10a de septembro 1984. Prospektoj kaj
aliĝiloj haveblaj ĉe: **ESPERANTO-SOCIETO
(MALTA), P.O. Box 142, Valletta, Malto.**